

# Tra la Mondo

## Tutmonda ilustrata Revuo esperantista

TRA-LA-MONDO-ESPERANTO SEMAS SIAJN BONAJOJN.  
PLI FACILIGAS LA KOMERCAJN, INTERRILATOJN, KONIGAS,  
LA INDAJN, ELTROVOJN, KUNHELPOS, POR ANSTATOVI  
DE FRUKTODONA PACO LA SANGAJN BATALADOJN.  
KIUJ DISSTRAS HOMARON.



Alegorio speciale verkita de Sinjoro Pillel, fama gravuristo de medaloj, sendita en la francan Roman lernejon post ricevo de V' granda premio.

Jara abono : 8 frankoj, ĉiulande. — Kvaronjara abono : 2.25 fr. — Unu kajero : 0 fr. 75 c.

# ĜENERALA PLANO KAJ ENHAVO.

	Paĝo.
Nunttempaĵoj : La konferenco de Alĝesiras ( <b>Hispanujo kaj Maroko</b> ), de <i>Gabriel Chavet</i> ( <b>Francujo</b> ) . . . . .	161
La fino de l' Hungara krizo, de <i>Endre Varju</i> ( <b>Hungarujo</b> ) . . . . .	162
Diversaj Sciencoj : Movado abstinenca en Svedlando, de <i>K. Gutke</i> ( <b>Svedujo</b> ) . . . . .	163
Militistaro kaj Maristaro : Esperanto kaj Maristaroj, de <i>A. Montrosier</i> . . . . .	165
Esperanto en la Armeo, de <i>Oficiro</i> . . . . .	166
Sporteĵoj : La Melbourn Pokalo, de <i>John Booth</i> ( <b>Aŭstralio</b> ) . . . . .	167
Pri Esperanto : Esperanto en Amerikaj Unuigitaj Ŝtatoj, de <i>D<sup>o</sup> Gambier kaj Steleto</i> . . . . .	169
Ĉirkaŭ la Kongreso, de <i>Steleto</i> . . . . .	171
Diversaĵoj : La Vivado de Teoplantisto en Hindujo, de <i>A. T. Simper</i> ( <b>Hindujo</b> ) . . . . .	172
Ĉiulandaj kutimoj : La flambrolaĵoj de Sankta Josefo ( <b>Hispanujo</b> ) . . . . .	174
Virina paĝo : Modo, de <i>Roksano</i> . . . . .	175
Felietono : La Torento el Saŭmo, de <i>Daniel Lesueur</i> , esp. de <i>J. Flourens</i> ( <b>Francujo</b> ) . . . . .	176
Miksaĵoj : Rezultato de l' 3 <sup>a</sup> konkurso, de <i>Ch. Brunet</i> . . . . .	

## REDAKCIO kaj ADMINISTRACIO.

NUR Miksaĵoj, t. e. : ludoj, amuzaĵoj, problemoj kaj solvoj devas esti sendataj al S<sup>o</sup> Brunet, 9, Cours Victor Hugo, Bordeaux, (France).

Manuskriptoĵoj, kaj mendoj KUN MONO al :

**Administranto de « Tra la Mondo », 15, Boulevard des Deux Gares, Meudon (S. et O), France.**

Oni bonvolu sendi la monon poŝtmandate — Nur de landoj ne havantaj internaciajn mandatojn, aŭ por pago de specimenoj, ni akceptas poŝtmarkojn, plenalore.

Oni povas ankoraŭ ricevi « Tra la Mondo » de l'unua numero.

## Al niaj abonintoj.

Kun la proksima numero finiĝos nia unua jaro. Ni jam komprenigis, la rezultato ne estis tio, kion ni esperis, rilate la nombron de niaj abonantoj, kaj ni ne povos tuj efektiviĝi tion, kio estis nia konstanta celo dum la tuta jaro : plidikiĝi la revuon tuj de nia 2<sup>a</sup> jaro.

Tamen, eĉ dum la 1<sup>a</sup>, ni pli kaj pli grandigis la enhavon, plimultigante la paĝojn presitajn per malgrandaj literoj, tiamaniere ke la legaĵoj ne suferu pro la ilustraĵoj multobliĝantaj.

Por ebligigi al ni preson de interesaj literaturaĵoj, ni eldonos la lastan numeron de tiu ĉi jaro kun 20 paĝoj, kaj tiu montros al niaj legantoj tion, kio estus daŭre la revuon, atendante eĉ novan plidikiĝon, se ili bonvolus propagandi sian « Ilustraton ».

Oni rekompencu nin je tiu ofero per agema helpo ; kaj almenaŭ, ĉiuj niaj abonintoj bonvolu tuj sendi sian reabonon monon.

Oni ĝentile komprenu, ke estas absolute necese, ke ni povu havi, tuj de l' komenco de nia dua ekzista jaro, certan bazon por starigi proksimume nian budgeton.

Tio ebligos, kiel eble plej rapide, la efektiviĝon de niaj projektoj ; kaj tio, kion ni jam liveris ebligas al ni diri ke la legantoj ne havus por plendi pro ilia plenumo !

« TRA LA MONDO. »

## « Tra la Mondo » kiel premio al lernantoj kaj dankonaco al profesoroj.

Ni jam diris ke S<sup>o</sup> Bord kaj la grupo de Anvers donacis abonon de « Tra la Mondo » kiel premio, ĉiu al la plej lerta studento de sia Esp = kurso. Nun estas lernintoj, kiuj en La Chaux-de-Fonds (Svisujo) donacis unujaran abonon al sia sindona profesoro, S<sup>o</sup> Favre, el Le Locle, kiel dankatesto. Jen estas, ŝajnas, ekzemploj sekvindaj je la momento kiam finiĝas multaj kursoj.

Fino Oxenford, nia delikata kunlaborantino, malavare subskribis du abonojn je « Tra la Mondo » por donaci al la publikaj Librejoj de Brighton kaj Hove (Anglujo). Koran dankon al tiu sindona propagandistino. Estu tiu ekzemplo sekvata.

## Nia kovrilo.

Ĝi ne plu taŭgas por nia revuo, aludante okazintaĵon kiu, ĝojinde, estas pasinta.

Nun Japanoj kaj Rusoj bataladas al la sama Esp. celo, kaj ni devas deziri, ke estu ĉiam kaj ĉie same.

Ni alvokas niajn amikojn pripensi pri temo elektinda por nova kovrila bildo, kaj sendi al ni la priskribon de l' sceno elpensita de ili. Ne estas necese ke oni limiĝu je alegorio aŭ almenaŭ je alegorio tro ekstermonda. Temo ebliganta realigon viglan kaj kapablan altiregi la atenton ŝajnas al ni pripensinda.

Antaŭe ni dankas por la sendaĵoj, laŭ kiuj estos eltirataj la definitivaj gvidaĵoj donotaj al la desegnton.

## BALDAŭ APERONTAJ :

La elsputo de « Monto Pelé », **Martiniko**, de Ingo Rollet de l'Isle ; en « Dauphiné » de So Sentis (**Francujo**) ; Bonfaremeco, de Bino von Sutter (**Aŭstrujo**), tr. de D<sup>o</sup> Hanauer (**Germanujo**) ; Elisabeth Browning (**Anglujo**) ; La Holanda Armeo, de Sinjoro Salomon (**Holandujo**) ; la Haveno La Rochelle, de Sam. Meyer (**Francujo**) ; Virina paĝo de C.W. Oxenford (**Anglujo**) ; Poŝta amo, de So Johano Muñoz kaj Pabón, esp. de J. Garcia Martin (**Hispanujo**) ; Ĉe sojlo de l'amo, de Radvan Ripinski (**Rusujo**) ; Gül Baba, legendo, de S<sup>o</sup> Altenburger (**Hungarujo**) ; Ibrahim, legendo, de D<sup>o</sup> Busutil (**Malto**) ; Virina amo, de H. Midthus, (**Norvegujo**) ; La Tragedio de l' Homo, de A. Götl (**Hungarujo**) ; La Skota Glavdancado, de Satler (**Anglujo**) ; Mnziko de Proháčka (**Bohemujo**) ; Ruinoj de Wisby, de Hedstrom (**Svedujo**) ; La fabrikado de l' pipoj, de M. David (**Francujo**) ; La Cedrarbaro de Teniet-el-Haad, de Mende (**Alĝerio**) ; Japanoj infanaĵ räkontoj, tr. de D<sup>o</sup> Gambier (**Francujo**), k. t. p., k. t. p.

# NUNTEM PAĴOJ

## La Konferenco de Algésiras

De GABRIEL CHAVET (Francujo).

Post longaj kaj malfacilaj diskutoj, la konferenco de Algésiras finis sian laboradon, kiel eble plej bone por la tutmonda paco. «Nenia venkinto, nenia venkito», oni diris; kaj tiu esprimo estas tre certe la idealan konkludon, dezirotan por ĉiuj internaciaj malkonsentoj. Ĉu vere, la pacamantoj, kiuj estas tre certe la plimulto el la tuta klera homaro, ne devas ĉiam deziri ke, en ĉiuj internaciaj diskutoj, nenia nacio povu esti konsiderata, kiel venkinto aŭ venkito? «Nenia venkinto, nenia venkito», tio signifas: «Nepra respekto de ĉiuj rajtoj, respekto de la justeco.»

Ĉiuj eŭropaj nacioj havas, en Maroko, specialajn interesojn kaj specialajn rajtojn. Sed la interesoj kaj rajtoj de Francujo estas speciale gravaj, pro la komuna landlimo, longa je 1200 kilometroj, inter Maroko kaj Algérie, kaj pro tiu fakto, ke Francujo regas ses milionojn da Mahometanoj, kies religio, raso, lingvo estas similaj je la raso, religio kaj lingvo de la Marokanoj. Ĉar ĉiuj enmarokaj malpacoj povas okazigi bedaŭrindeajn efektojn en Algérie; ĉar la ekonomiaj interesoj de Francujo en Maroko, estas grandegaj, tiu nacio speciale deziris ke oni donu al ĝi la rajton alporti eŭkan helpon al la Maroka sultano por restarigi ordon kaj pacon en lia imperio.

La fina decidaro de la konferenco havas tripartan fundamenton: suverenecon de la sultano, nepartigon de la imperio, komercan liberecon. De la unua kunsido de la konferenco, la prezidanto proponis ke tiuj tri punktoj estu nediskuteblaj. La tuta laboro de la konferenco konsistis akordigi tiujn tri kondiĉojn kun la specialaj rajtoj kaj interesoj de Francujo.

La du gravaj demandoj, kiuj estis solvotaj de la konferenco estis tiu de la polico kaj tiu de la banko.

La organizo de la polico estas alkonfidita al oficiroj francaj kaj hispanaj. Ili devos instrui la marokajn policistojn kaj helpi la organizon de ŝerifaj policistaroj. Ili agado estos kontrolata de ĝenerala inspektoro, kiu estos alta oficiro de la Svisa armeo. Sed la tuta diplomataro de Tanger devos legi la raportojn prezentitajn de tiu inspektoro al la «Magzen» por konstati, ĉu la decidoj de la konferenco estas respektataj, kaj ĉu la organizo, tiel starigita, taŭgas por la senriskeco de la loĝantoj, de la bienoj, kaj de la komercaj entreprenoj.

En la organizo de la Regna Banko, la konferenco donas grandan rolon al Francujo.

Legante la multajn regulojn de la fina decidaro, kelkaj personoj timemaj povos pensi, ke tiel komplika kaj internacia organizo estas nur fonto de venontaj konfliktoj, ke por certigi la daŭron de la eŭropa paco, oni devus eviti tiajn arandojn, kiuj donas al la nacioj, multajn okazojn por kontraŭstarigi siajn diversajn interesojn kaj rajtojn, ke la tutmonda historio pruvas, ke ĉiuj internaciaj organizoj, kiuj donis nur provizoran konkludon de ia internacia politika problemo, kaŭzis poste

gravajn disputojn kaj konfliktojn. Sed laŭ nia opinio, tiuj timoj estas certe trograndaj. Nuntempe, ekzistas eŭropa konscienco. Vole aŭ nevole, la nacioj konstatas, ke ilia solidareco devigas ilin akordigi, por prizorgi pri siaj komunaj intereso. La laboro por solvi pace la marokan demandon estis tre longa kaj malfacilega; la persistemo, la pacienco, la bonvolo de la ĉiunaciaj delegitoj montrantaj sian energian deziron eviti malpacon, montris ke Eŭropo volas pacon, ke ĉiu nacio preferas cedi pri kelkaj negravaj punktoj, forlasi pretendojn eble pravajn, pli ol persisti kaj kaŭzi tiun abomenindan katastrofon, kiu estus hodiaŭ eŭropa milito. — Eĉ ni diros ke, laŭ ni, internaciaj organizoj kiel tiu starigita de la konferenco de Algésiras, estas bonfaroj por la venonta paco. Tiuj organizoj alproksimigas la diversajn naciojn; devigas ilin pli bone interkonatigi; pli ofte interrilatigi; ili ĉiunomente memorigas la ekziston de tiu konscienco de Eŭropo, pri kiu ni supre parolis kaj kiu ekzistas, super la apartaj kaj naciaj interesoj.

Komprenoble nia opinio devas esti aplikata nur al la internaciaj organizoj, kiuj (kiel tiu, kiun kreis la konferenco de Algésiras) havas civilizan, pacan celon, kiuj estas kreataj, interkonsente

kun la nacio, kiu devas uzi tiun organizacion. Sed, kiam la internaciaj akordigoj celas, ĉu perfortan agadon kontraŭ malforta najbaro, ĉu komunan rifuzon alporti helpon al persekutita popolo, ili devas esti tute malaprobataj.

La du plej atentindaj faktoj de la longa laborado de la konferenco estas la helpoj donitaj al Francujo de Italujo kaj Rusujo. La helpo de Rusujo estis aparte grava. La energia sintenado de Grafo Cassini, rusa delegito, surprizis tiujn, kiuj pensis ke, de la paca traktato de Portsmouth, Rusujo ne



ABD-UL-AZIZ, MAROKA SULTANO.

havas plu sian antaŭan lokon en la eŭropa grupo de la nacioj, ke ĝi estas konsiderebla kiel senpova, senefika venkito, nur sin okupanta pri la restarigo de siaj antaŭaj fortoj, kaj pri la solvo de siaj internaj politikaj konfliktoj. La rolo de Grafo Cassini pravas, ke tia konsidero estis tute neĝusta, kaj, montrante, ke malgraŭ ĉio, Rusujo konservas sian ĝisnunan gravan lokon, ĝi redonis samtempe al la franca-rusa interligo, la forton, la potencon, kiuj mankis al ĝi, dum la rusa-japana milito.

Laŭ tiu vidpunkto, la konferenco de Algésiras restarigis la ekvilibron de la eŭropaj fortoj, detruitan dum la lasta milito.

La sintenado de Italujo surprizis la personojn, kiuj pensas ke hodiaŭ, ekzistas ankoraŭ, en la internacia politiko, « principaj malamikoj ». Tiu ideo ankaŭ estas pasintaĵo. Kial, ĉar

Italujo estas ligita kun Germanujo, ĝi devus havi ĉiam la saman opinion kiel Germanujo? Tiu ideo estas restaĵo de la malnova politiko de la sentoj, nun prave anstataŭita de la politiko de la intereso. Interligo ligas nur pri specialaj punktoj aŭ okazoj, sed ne pri ĉiuj ajn. La libera opiniado de Italujo estas bona antaŭsigno por la paca estonto. Nun, ni scias ke, kiam internacia malkonsento okazos, la nacioj ne obeos siajn ligojn blinde kaj principe, ke la du aŭ tri ligoj ne tuj kontraŭstaros, unu kontraŭ la alian; sed ke ĉiu nacio pripensos kaj agos laŭ sia propra konscienco. Kaj, ĉar en ĉiuj eblaj malkonsentoj, la tuta Eŭropo havas interesojn, oni povas esperi ke, de nun, la konservo de la paco konsistos pli el saĝa akordiĝo de tiuj intereso, ol el malfacila ekvilibro de la armeaj fortoj.

GABRIEL CHAVET.

## Fino de la politika Krizo en Hungarujo

De Sinjoro ENDRE VARJU (Budapest).

### La Hungara Krizo.



BARONO FEJERVARY.

Post la disigo de la parlamento la registaro regis kun milita kaj polica potenco; la konstitucio jam estis en danĝero kaj komencis la absolutismo, kiam la reĝo konvinkiĝis, ke tiu ĉi rimedo ne estas laŭcela, do li komisiis ministrestrojn Fejérváry trakti denove kun la koalicio.

La traktado havis nun sukceson; la 8<sup>an</sup> de Aprilo fondiĝis la nova ministraro el membroj de la koalicio sub la prezido de A. Wekerlé.

La sukceso ne estis plena ĉar la militaj demandoj restis ne solvitaj; tamen la nacio estas en l' entuziasmo pro la saĝa decido de la reĝo, kiu restarigis la konstitucion; ĉiuj esperas ke, post la baldaŭa malfermo de la parlamento, ĉiuj deziroj realiĝos.

La apudaj ilustraĵoj montras la portretojn de la novaj ministroj: Andrassy (internaj aferoj), Kossuth (komerco), kaj de la eksministrestro Fejérváry.

S<sup>o</sup> KOSSUTH.ENDRE VARJU.  
El Budapest.

### Kruela perdo.

Je la fino de Aprilo, « His Majesty's Theatre » (La teatro de Lia Moŝto) dediĉis plenan semajnon al verkoj de Shakespeare. La programo, mirinde elektita de S<sup>o</sup> Beerboom Tree, konsistis el *La Ventego*, *Henriko IV<sup>a</sup>*, *La Dekdua Nokto*, *Hamleto*, la *ĉojemaj babilmulinoj de Windsor* kaj *Julio Cezar*.

Tiu programo duoble interesas la Esperantistojn per *Hamleto* kaj *la Ventego*. Ni ne povas citi tiun lastan verkon ne memorigante pri la nomo de Achille Motteau, kiun la morto frapis tro frue por liaj amikoj kaj por Esperanto.

Tie ĉi mem, ni havis okazon laŭdi lian talenton, kiam aperis lia lasta verko: *Si klini'as por venki*. Li preparis tradukon de dramo de Shakespeare, kiun li intencis dediĉskribi al S<sup>o</sup> Montrosier kaj ankaŭ li estis verkanta por «Tra la Mondo» ilustratan artikolon pri la granda angla poeto, kiun li speciale studadis kaj perfekte konis. Niaj amikoj perdas do duoble, kiel Esperantistoj kaj kiel legantoj de «Tra la Mondo».

Al lia familio ni sendas niajn sincerejn bedaŭrojn.

« T. L. M. »



GRAFO ANDRASSY.

### Ĉe la Franca Parlamento.

Kelkaj francaj deputitoj prezentis je la Franca Duptitaro projekton de decido, laŭ kiu:

«De la instrua jaro 1907-1908, la lernado de la internacia lingvo Esperanto estos enskribita en ĉiujn programojn de l' publika instruado, kiuj celas la instruon de l' parolataj lingvoj».

Ĝin subskribis la jenaj progresemaj homoj: Lucien Cornet, Paul-Meunier, Bouhey-Allex, J. L. Breton, Camuzet, Roblin, Bouveri, Thivrier, Antide Boyer, Benezech, Chauvière, Delory.

La grupo de Sens, per « L'Espérantiste », alvokis la francajn grupestrojn, por ke ili agu al siaj deputitoj dum la balota periodo.

Estas dezirinde ke tiu alvoko estu aŭdita, ĉar pli kaj pli la oficiala apogo estas necesa. Ni jam diris kaj ne laĝigos rediri; kaj pro tio ni penadis, en Alĝerio, varbi Parlamentanojn, kaj, el 9, ni sukcesis esperantigi 5. Se ĉiuj grupoj tiel agus, la sukceso ne estus duba.

A. M.



# Movado abstinenca en Svedlando.

Originalo de K. GUTKE, el Stockholm.

Oni konas la gravecon kaj la amplekson de l' abstinenca movado en Svedujo. Ŝajnis do al ni interesinde enpresii artikolon pri tiu movado, kaj ni petis ĝin al samideano tre klera pri tiu temo. S<sup>o</sup> Gutke, el Stockholm, bonvolis verki por ni la sekvantan tre interesan artikolon. Ni treege atentigas nian legantaron pri la konkludo de l' artikolo, kaj la alvoko farita de nia kunlaboranto.

« Milito » kaj « Alkoholismo » estas la nomoj de la plej danĝeraj malamikoj de la homaro. La unuan malamikon oni provas venki per granda paca movado, sed la duan malamikon oni rigardis pli-malpli indiferece, kvankam ĝi estas tiel danĝera kiel la unua. La militoj estas periodaj, sed kontraŭe la alkoholismo estas ĉiama. Ĉiu konas la malbonajn sekvojn de la alkoholismo: la mizeron de la familioj, la malfortiĝon, malsanecon kaj tro fruan morton de la homaro. Sed tiu situacio daŭris dum centjaroj. Oni tiel kutimiĝis je tiu malamiko, ke oni ĝin ne vidas. Sed en tiu ĉi civilizita epoko oni komencas « vekigi », oni « vidas » ankaŭ tiun malamikon, kaj oni provas ĝin venki pli-malpli sukcese. La unua abstinencula klubo fondiĝis en la jaro 1851<sup>a</sup> en urbo *Unca*, ŝtato *Novjorko*, *Unuĝaj Ŝtatoj*, *Ameriko*. Filioj poste fondiĝis en la ŝtatoj *Pennsilvanio*, *Kanada*, *Illinois*, *Indiana*, *Missouri* kaj *Wisconsin*. Tiu ĉi klubo daŭrigas en la hodiaŭa tago sian agadon sub nomo: « *The Independent Order of Goodtemplars* » « *Sendependa Ordeno de Bontemplanoj* ». La celo de tiu klubo estas: « *Tuta abstinenceco de la individuoj* ». « *The world is our field.* » (La mondo estas nia labor-kampo) estis ilia fiera proverbo, kaj ili ankaŭ provis efektiviĝi ĝin, spite de ĉiuj malfacilaĵoj. Per fervora agitado ili kreis novajn filiojn en ĉiuj mondpartoj. En Eŭropo la unua filio fondiĝis en urbo *Birmingham* (Anglujo) en la jaro 1868<sup>a</sup> de S<sup>ro</sup> *Josef Malins*. En la tuta mondo troviĝas nun 700.000 « bontemplanoj ». La sveda filio fondiĝis en urbo *Göteborg*. En la jaro 1879<sup>a</sup> ĝi estis nur unu klubo, sed nun ĝi fariĝis grandega klubaro, konsistanta el 2064 lokaj kluboj, dislokitaj en ĉiuj svedaj urboj. Sume la nombro de la membroj de tiu klubaro estas 140.000. Ĝia oficiala organo estas « *Reformatorn* » (adreso: 39 *Jakobsbergsgatan Stockholm* Svedl).

Sed la « *Sendependa Ordeno de Bontemplanoj* » ne estas la sola klubaro abstinencula en Svedlando. Ankaŭ ekzistas « konkurantaj » klubaroj abstinenculaj. Tiuj ĉi samcelaj klubaroj estas egale organizitaj, egale energiaj, egale prudente kondukataj; ĉiam ili konkuras, sed neniam reciproke malhelpas sin. Oni fondis tiujn « konkurantajn » klubarojn abstinenculajn pro tio, ke ne plaĉis al multaj el la abstinenculoj la regularo de la « *Sendependa Ordeno de Bontemplanoj* », kiu estas el « *amerika* » deveno. Precipe la « ceremonioj » ne plaĉis al ili, sed multaj aliparte opiniis, ke tiu klubaro estas « tro religia ». La nomoj de la « konkurantaj » klubaroj abstinenculaj estas:

N<sup>o</sup> 1: *Sveriges Blabandsförening* (*Sveda Blua-Rubandista Klubaro*) fondiĝis en la jaro 1883<sup>a</sup> de presisto *Oskar Eklund* en *Stockholm*. Ĉiu membro de tiu klubaro ornamas sian veston per malgranda blua rubando. Estas « *religia senceremonia klubaro abstinencula* ». Ĝi havas nun 75.000 membrojn. Ĝia

oficiala organo estas: « *Bla Bandet* » (adreso: *Orebro Svedlando*).

N<sup>o</sup> 2: *Sveriges Nationaltempel af Templarorden* (*Sveda Nacia Templo de la Templordeno*) fondiĝis en la jaro 1883<sup>a</sup> de S<sup>o</sup> *Adolf Peterson*. Rilate al politikaj kaj religiaj demandoj la klubaro estas senpartia. Ĝi havas nun pli ol 50.000 membroj kaj 922 lokajn klubojn. Ĝia oficiala organo estas « *Templaren* » (adreso: 5 *Bryggaregatan Stockholm Svedlando*).

N<sup>o</sup> 3: *National-Goodtemplarorden* (*Nacia Ordeno de Bontemplanoj*) fondiĝis en jaro 1888. Ĝi estas organizita laŭ la principoj de la « *Sendependa Ordeno de Bontemplanoj* », sed havas aliajn opiniojn pri « *la promeso je abstinenceco* ». Ĝi havas nun 30.000 membrojn kaj 206 lokajn klubojn. Ĝia oficiala organo estas *National-Kuriren* (adreso: *Vestergatan 2 Villa Tabor Göteborg Svedlando*).

N<sup>o</sup> 4: « *Nykterhets-Orden Verdandi* » (*Abstinencula Ordeno Verdandi*) fondiĝis en la jaro 1896<sup>a</sup>. Estas « *social-demokrata klubaro abstinencula* ». Ĝi havas nun 10.000 membrojn kaj 205 lokajn klubojn. Ĝia oficiala organo estas « *Verdandisten* » (adreso: 44 *Vestmannagatan Stockholm Svedlando*).

N<sup>o</sup> 5: *Hvita Bandet* (*La Blanka Rubando*) estas « *krista klubaro abstinenculina* » kaj filio de la « *amerika* » klubo: « *Worlds Womans Christian Temperance Union.* » (*Unuĝo abstinenca de la kristanaj virinoj de la mondo*). La sveda filio fondiĝis en la jaro 1890<sup>a</sup>. Tiu ĉi klubaro bataladas kontraŭ ĉio, kio malfortigas la homan korpon kaj malhonoras la homaron, kiel *alkoholismo*, *tabakuzado*, *malĉasteco*, *ludpasio*, *milito*, *bestturmentado* k. t. p. Ĝi havas 2000 membrojn kaj 35 lokajn klubojn. Ĝia oficiala organo estas « *Hvita Bandet* » (adreso: *Doktorinnan Wretlind 27 Uplandsgatan Stockholm Svedlando*). Ĉiu membro de tiu klubaro ornamas sian veston per malgranda blanka rubando.

N<sup>o</sup> 6: *Sveriges studerande ungdoms helnykterhetsförbund* (*La abstinencula ligo de la junaj gestudentoj svedaj*) fondiĝis en la jaro 1896<sup>a</sup>. Estas « *gestudenta klubaro abstinenca* », kiu havas 6.200 membrojn kaj 130 lokajn klubojn. Ĝia oficiala organo estas « *Potstjärnav* » (adreso: *Upsala Svedlando*).

Tiuj ĉi klubaroj abstinenculaj kunlaboras inter si per la klubo: *Centralförbundet för nykterhetsundervisning*. (*Centra ligo por instruado porabstinenca*), kiu per sciencaj argumentoj pravas la difektigan efikon de la alkoholo en la homa korpo. Tiu ĉi klubo dissendas malgrandan gazeton « *Daggdroppen* » (adreso: 39 *Jakobsbergsgatan Stockholm Svedlando*) al la lernantoj de la popolaj lernejoj. Krom tiuj grandaj klubaroj ekzistas multaj profesiaj kluboj abstinenculaj ekz. *poŝtistaj*, *fervojistaj*, *telegrafistaj*, *pastraj*, *inĝenieraj*, *laboristaj*, *kuracistoj* k. t. p. Kaj multaj novaj kluboj estas en fondado.

La akcelado de la abstinenca afero en ekstersved-

aj landoj kompreneble ankaŭ estus utilega. Nun ekzistas pli grandaj kluboj abstinencaj nur en Ameriko, Anglujo, Polujo, Hungarujo, Germanujo, Norvegujo kaj Danujo, sed kompare je la grandaj svedaj klubaroj ili estas malgrandaj. Sciante, ke Svedlando havas 5 milionojn da loĝantoj kaj ke la nombro de la svedaj aktivaj abstinenculoj estas 350.000, oni povas prezenti al si la grandegecon de la sveda movado abstinenca. La sperto pravas, ke oni devas aranĝi la movadon abstinencan laŭ la politikaj kaj religiaj opinioj de la homoj kaj krei novajn « branĉojn » de tiu movado, por ke ĝi plene prosperu. Tial oni senĝene povus fondi *katolikajn, mohametajn, budistajn kaj hebreajn klubojn abstinenculajn*. Kiu scias? Eble en la estonto tiu ĉi projekto efektiviĝos.

Gojigan novaĵon mi prezentas al la esperantistaro. Favormovo por Esperanto komencis en kvar klubaroj abstinenculaj nome: « *Sendependa Ordeno de Bontemplanoj* »; « *Sveda Nacia Templo de la Templordeno* », « *Abstinencula Ordeno Vernandi kaj La abstinencula ligo de la svedaj studentaj gejunuloj* ». En la « *Sendependa Ordeno de Bontemplanoj* » kaj « *Sveda Nacia Templo de la Templordeno* » kursoj de Esperanto estas farataj, ĉiu sekvata de dudeko da lernantoj. En « *Abstinencula Ordeno Verdandi* » kaj « *La abstinencula ligo de la svedaj studentaj gejunuloj* » kursoj komencos kiel eble plej baldaŭ. Du lokaj esperantistaj grupoj de « *Bontemplanoj* » fondiĝis, nome unu en la urbo *Sundsvall* laŭ la iniciato de *Sro Erik W. Bogren* en la gazeto *Nordsvenska Posten*; la dua en la urbo *Hudiksvall*, laŭ la iniciato de *Sro J. J. son Hanzén* en la redakcio de *Hudiksvalls Nyheter*. Alia « *Bontemplano* » *Sro Rudolf Mansson (11 Hamngatan)* en urbo *Karlshamn* iniciatas fondon de grupo esperantista en la tiea krista unuigo de junuloj. Plie alia abstinenculo *Sro Gust. Roibard Torsby* (Svedlando) anoncis en la kvara numero 1905<sup>a</sup> de la revuo « *Lingvo Internacia* », ke li deziras korespondadi kun ĉiulandaj esperantistoj pri sobrecaj faktoj. La gravecon de tiu ĉi favormovo por Esperanto, oni povas prezenti al si, eksciinte, ke la abstinencularoj dank' al siaj fortikaj organizoj kaj kondukoj de energiaj, klarvidantaj, viroj okupas lokojn, el kiuj ili sukcese influas al la politika kaj ankoraŭ pli al la sociala vivo. En ĉiuj abstinenculaj klubaroj ekzistas « *gejunulaj rondoj* », kie kursoj

de diversaj lernindaĵoj estas farataj, kiel lingvoj, stenografio, leĝoscienco k. t. p. La porabstinencula gazeto « *Templaren* » organo de la « *Sveda Nacia Templo de la Templordeno* » enpresis artikolojn pri Esperanto titolitajn « *Esperanto en kvin lecionoj* », kiuj priskribis la nunan disvastiĝon de nia lingvo kaj klarigis ĝian tutan mekanismon kaj gramatikon. Tiu ĉi gazeto intencas malfermi siajn kolonojn por artikoloj *skribitaj en la lingvo Esperanto* komence enhavantaj klarigajn notojn pri la *metodoj, venkoj kaj gajnitaj spertoj* en la sveda movado abstinenca. Per tio oni povus pligrandigi per eksterlandaj esperantistoj la abonantaron de « *Templaren* », plue ekflamigi pli fruktoportantan intereson por la sobrega afero en landoj, kiuj nun estas sen komuna kontraŭalkohola movado. Ni petas la esperantistojn, kiuj deziras aboni tiun gazeton, ke ili bonvolu raporti sian abonintencon kiel eble plej baldaŭ al « *Redaktionen af Templaren, 5 Bryggargatan Stockholm* » (Svedlando). La publikigado de esperante skribitaj kolonoj en tiu gazeto certe donos rapidiĝon al la propagando de Esperanto en la tuta Svedlando, ĉar la sveda abonantaro de tiu gazeto konsistas el ĉiuj specoj de abstinenculoj. Ankaŭ aliaj porabstinencaj gazetoj enpresis artikolojn pri Esperanto nome « *Reformatorn* » « *Verdandisten* », « *Daggdroppen* ». Ni petas la eksterlandajn esperantistojn, unue sciigi al siaj samnaciaj la svedan movadon abstinencan kaj inter ili ekflamigi favormovon por la sobrega afero kaj por Esperanto; plue sciigi al ni la disvastecon de la eksterversveda movado abstinenca kaj se eble ankaŭ la adresojn de esperantistoj-abstinenculoj. Ni petas ĉiun esperantiston, ke li bonvolu traduki tiun ĉi artikolon en sia lingvo kaj publikigi ĝin en la plej gravaj *ĵurnaloj ĉiutagaj, gazetoj kaj revuoj* de sia lando. Per tio oni atingus du bonajn celojn, unue « *Tutmondan organizon abstinencan* », kiu liberigus la homaron el la malbonaj sekvoj de la alkoholismo, due « *La disvastigadon de Esperanto* », kiu faciligus la movadon abstinencan. Per komuna kunlaborado kaj reciproka interŝanĝado de ideoj fruktoportantaj, oni atingos la celon de ĉies penadoj, nome: « *La feliĉon de la homaro* ».

Originale verkita de

K. GUTKE (16, Brunnsgratan, Stockholm).

## DIVERSSCIENCA NACIA GAZETARO.

Nia distinginda kunlaboranto, *So Evrot*, sukcesis enpenetriĝi Esperanton en « *Bulletin de la Société des Naturalistes de l'Als* ». Tiu beleta ilustrata revuo enhavas, de nun, artikolojn Esperante kun apuda franca traduko. La rubriko komencis (15. III. 06) per la represo de l'interesa artikolo de *So Evrot* pri la fama *Brou's* preĝejo, enhavita en niaj 2<sup>a</sup> kaj 3<sup>a</sup> n<sup>o</sup>j. Tute prave diras *So Evrot*: « *Estas dezirinde kaj espereble ke, en baldaŭa estonto, ĉiuj revuoj de tiel multaj lokaj sciencaj societoj enhavos esperantan parton, por kunligi kaj interrilatigi la diverslandajn scienculojn. Kiel facilege, per Esperanto, la disaj membroj de tiuj societoj: geologiistoj, botanikistoj, k. t. p. povus, de unu al alia lando, korespondi pri la temo de siaj elserĉadoj, peti sciigojn pri tiu aŭ alia punkto, organizi metode siajn laboradojn kaj esploradojn, unuvorte kunmeti siajn pensojn kaj celadojn! Kiel facilege ili povus (tion ja pruvis mirige kaj nerifuteble la Bulonja Kongreso) kunveni en la saman urbon por diskuti buŝe, per la sama helpa lingvo, la plej gravajn demandojn, sen la nevenkeblaj malfacilaĵoj de diversaj lingvoj kaj de tradukoj neĝustaj kaj ridindaj.* »

Oni ne povas pli bone diri, kaj estas tie riĉamino ekspluatinda, por niaj aktivaj samideanoj. Ni aldonu ke la francaj « *Ĉefeĉoj* » estas enmetitaj en ĉiu n<sup>o</sup> de la revuo, por ke la

legantoj povu, senpene kaj agrable per legado, konatiĝi kun Esperanto.

Tio rilatas tion, kio povus esti nia devizo « *Ni estu praktikaj* » kaj montras, per agoj, la povon, la utilon de Esperanto. Plezure ni vidas ke, pli kaj pli, oni suriras tiun vojon.

« *Obchodní Listy* » revuo por financistoj kaj aferistoj, dediĉas 4 1/2 paĝojn por kurso kaj kroniko esperantaj.

« *La Plume Stenographique de France* » universala revuo ilustrata de Stenografio kaj Daktilografio, enhavas ankaŭ « *Esperantistajn skribaĵetojn* », ĝis nun nur en franca lingvo, sed tre favoraj kaj utilaj por la propagando. La sukceso de la revuo, legata de multaj ĉiulandaj specialistoj, estas larĝe pravigata de ĝia interesa enhavo. « *The Australasian Typographical Journal* » (1. I. 06) enhavis interesan artikolon pri la agado de la *Melbourn* grupo, kies komitato vizitis, la 20<sup>an</sup> de Decembro, le « *Age office* ». La prezidanto — nia kunlaboranto *Sro Booth* — tre interesita kiel la komitatanoj, de la presmaŝinaro, sukcesis presi mem, per la linotipo, la jenan frazon: « *Esperanto estas taŭga por la tuta mondo* », t. e., angle: « *Esperanto is serviceable for the whole world.* » Bonega rimedo estas tiu simpla fakto, diskonigita, per « *The Australasian typographical Journal* » ĉe multaj kompostistoj aŭstraliaj.



Kopiraĵo.

LA ŜIPARETO DE S<sup>o</sup> DUCHOCHOIS EN HAVENO BULONJO-SUR-MARO.

## Esperanto kaj Maristaroj.

Dum siaj vojaĝoj, la maristoj renkontiĝas, en la havenoj, kun ĉiunaciaj homoj, kaj en la pli multaj okazoj, ne povas ekinterrilatiĝi kun ili por vendi siajn komercaĵojn aŭ por sciigi. Estus do dezirinde ke, en la havenoj, Esperanto rapide disvastiĝu. Tion bonege komprenis unu el niaj agemaj propagandistoj, S<sup>o</sup> Duchochois, vic-prezidanto de la grupo de Bulonjo-sur-Maro, Ŝip-eksploatisto (fr. : armateur, germ. : rheder, kaj por altiri la atenton pri Esperanto en la havenoj kie liaj ŝipoj ventflosigas la francan standardon, li sube aldonis, grandamplekse, la Esperantan flagon alprenitan dum la 1905<sup>a</sup> Kongreso. Jen estas praktika kaj decida iniciativo, inda esti diskonigata en ĉiuj landoj, por ke ĉiuj havenaj esp. grupoj klopodu apud ŝip-eksploatistoj, tiamaniere ke, ĉie dismultobligante, nia glora standardo proklamu, sur ĉiuj maroj, la progresojn de nia afero.

Ni estas feliĉaj doni al niaj gelegantoj vidaĵojn de la ŝipareto de nia progresema samideano.

Malmulte da penado sufiĉas, ĝi ŝajnas, por atingi tiun deziregindan celon, ĉar la maristaroj estas eble tiuj, kiuj pleje bezonas interkomprenilon: Esperanto mirinde plenigus la « marsignalan internacian leĝaron », ebligante ĉiam interŝanĝi parolojn post interŝanĝo de signaloj kaj alproksimiĝo de ŝipoj.

So Duchochois havis ankaŭ alian bonegan ideon. Ĝis nun, krom mal-

oftaj esceptoj, la Esperantistoj interrilatiĝas por interŝanĝi amuzilojn: ĉu la momento ne venis por fondi grupon aŭ grupojn el personoj dezirantaj uzi letere esperanton al utilaj celoj, ekz. el samprofesiaj vivantaj de en = kaj elportato.

Ĉiu ano ludus en sia urbo rolon de korespondanto — tradukisto por la aliaj, kaj tiel povus fari netakseblajn servojn al siaj samgrupoj, kun certeco pri reciproka helpo.

Estas tie ideo fruktoportonto. Ni deziras varmege ke niaj samideanoj ĝin komprenu, kaj instigas ĉiujn personojn, kiuj aprobas la ideon sin turni al S<sup>o</sup> Maurice Duchochois (Boulogne-sur-Mer, France) kiu klopodas por fondi tian grupon de « Praktikaj Esperantistoj », kies nomaron li eldonos kiel eble plej frue.

A. MONTROSIER.

Ni varme petas la legantojn de tiu artikolo kaj niajn esp. kunfratojn konigi la praktikan iniciativon de S<sup>o</sup> Duchochois. Laŭ ni la samideanoj loĝantaj en Havenoj, kie kutime alboridiĝas liaj ŝipoj devus, kiam tiuj ĉi estas ĉe la kajoj kaj montras la verdan flagon sendi al la lokaj gazetoj, artikolojn por atentigi ilian legataro pri tiu kurioza propagando.

Certe tiaj artikoloj multe faros por la propagando, Sinjoro Duchochois havis ideon: el ĝi ni devas ĉerpi la maksimuman profiton por nia kaŭzo.

« T. L. M. ».



Kopiraĵo.

LA VERDA STELO VENTFLOSANTA.

Oni legas en l' « Albumo de konataj Esperantistoj » :

« Sinjoro Kapitano Capé la sukcesplena propagandisto Alĝera (ĝis 1905) atingis la dekreton de l' milita ministro franca, ke ĉiuj oficiroj kaj soldatoj de l' franca armeo povas sen speciala permeso aliĝi al la Esperantismo. Tiu ĉi mirinda paŝo efikis bonege... »

La aŭtoro de la notico komprenis ke, efektive, la plej bela glortitolo por nia samideano estas la grava rolo, kiun li ludis en la disvastigo de Esperanto en la milita mondo.

Antaŭ lia agado, kelkaj oficiroj okupiĝis pri Esperanto, aparte Komandanto Lovendowski en Epinal; li mem estis anĝinta persone al la S f p E, sed tiuj agadoj ne estis konformaj al la franca milita regularo, kiu postulas ke militistoj ĉiugradaj ne aliĝu al la ajn Societo sen antaŭa permeso.

Tuj kiam li intencis, ne sole uzi Esperanton kiel persona okupo, sed bataladi por ĝi, Kapitano Capé, dezirante resti en la leĝeco, kaj antaŭvidanta kia valora atuto estus, en la ludo de l' Esperantistoj, oficiala akcepto de Esperanto, petis, por ĉiuj francaj oficiroj, la permeson aniĝi al la S f p E kaj al la lokaj grupoj; kaj, por li mem, tiun propagandi Esperanton kaj fondi grupon en Alĝero, kie li tiam garnizonis.

Tiu peto, hierarkie apogita kaj favore prezentita al la milit-ministro, generalo André, ricevis favoran respondon, konigita jene al la petinto :

La milita ministro al la Generalo komandanta la 19<sup>an</sup> korpuson de l' armeo en Alĝero.

En la dato de l' 18<sup>a</sup> de Oktobro lasta, vi transigis al mi peton faritan de Kapitano Capé, helpanto en la Artileria Direkcio de Alĝero, celantan ricevi la permeson partopreni en la propagando farita en Francujo por la tutmonda helpa lingvo « Esperanto », aniĝi en la grupoj, kiuj okupas sin je tiu propagando kaj fondi, kun la helpo de liaj kolegoj ĉe l' armeo, samspecan grupon en Alĝero.

Mi havas la honoron sciigi al vi, ke por favori al la etendiĝo de la helpa tutmonda lingvo, mi permesis en la dato de l' 12<sup>a</sup> de Novembro, al la oficiroj kaj kvazaŭoficiroj, kiuj tion deziras, enviciĝi en la Société pour la propagation de l'Esperanto, kies sidejo estas en Vincennes, rue du Levant, n<sup>o</sup> 6, kaj aniĝi en la diversaj grupoj esperantistaj.

Cirkulero senprokraste konigos tiun ĉi decidon al la interesatoj per la rimedo de la Oficiala Bulteno. Mi petas vin sciigi pri tio S<sup>on</sup> Kapitanon Capé.

Subskribita : NELEGELE.

Ne atendinte la oficialan respondon, kies favorecon li konis antaŭe, private, Kapitano Capé fondis la Alĝeran grupon la 20<sup>an</sup> de novembro 1903<sup>a</sup>; kaj tio ĉi estis la deirpunkto de agado senĉese daŭrigota, kiu, en kelkaj monataj, disvastigis la Esperantan ideon en la tuta Alĝerio kaj en Tunizion, igante tiam la alĝeran grupon unu el la plej gravaj, kaj diskonigante tutmonde la nomon de nia amiko.

Sed ĉi tio ne estas la afero : la antaŭcinita permeso instigis tuj energian movadon ĉe la oficiroj kaj baldaŭ fondiĝis la grupoj de Clermont-Ferrand kaj Bourges, grandparte dank' al militestroj, inter kiuj la tre konata Komandanto Matton; de Valenciennes, post la agado de Intendant Bastien.

Senbare, samtempe, la lokaj grupoj povis klopodi apud oficiroj, tiuj ĉi ne plu havantaj la timon okupiĝi pri afero ne permesita; kaj ankaŭ, la personaj iniciativoj troviĝis multe plifaciligitaj. Tiel, S<sup>o</sup> Cart, kiu komprenis tuj la gravecon de l' agado entreprenita de sia malnova lernanto, iginta lian kun-

La 20<sup>an</sup> kaj 27<sup>an</sup> de Majo, okazis paroladoj de S<sup>o</sup> Cart en la « Politeknika Lernejo ». Nova paŝo por la milita propagando.

S<sup>o</sup> Cart ne longe atendigis la pleniĝon de « Esperanta Radikaro ». La « ŝlosilo » ĵus aperis kaj kostas 10 cent. Do la tuta verko kostas 0,80 af (0,90 ĉe ni. Ni denove kaj tre serioze atentigas pri ĝi ĉiujn verajn Esperantistojn. La 23<sup>an</sup> de Majo, nova vesperfestoj, la C. O. Tiun ĉi fojon S<sup>o</sup> Carlo Bourlet povis paroli, kaj ĝin faris kun sia kutima sukceso.

La 8<sup>an</sup> de Majo fondiĝis, sub prezidanteco de S<sup>o</sup> Carl Feyerabend (S<sup>o</sup> Carl Barthel, sek<sup>o</sup>) « Internacia Komercista Esperanta Societo ». Ni reparolos pri tiu grava fakto, kiu, ja, rilatas pri la projekto de S<sup>o</sup> Duchochois. La nova Societo eldonos « Internacian Komercan Revuon ».

La 4<sup>an</sup> de Junio edziĝos nia kunlaboranto, S<sup>o</sup> de Marich, Redr<sup>o</sup> de « Esperanto » hungara, kun Frin<sup>o</sup> Johano Bigler, filino de S<sup>o</sup> A. Bigler, ĉefinspektoro de la Danuba Ŝipa Societo.

batalanton, kaj kiu, iom poste, sukcesis eniri kiel profesoro en la Parizan militan klubon, skribis al Kapitano Capé :

« ... dank' al vi (trifoje substrekitaj en la teksto), mi malfermas jaŭde, ĉe la milita rondo, Esperantan kurson je 5 1/2 horoj (6 lecionoj). Post la permeso de l' ministro, la Pariza guberniestro ne povis tion rifuzi, kaj li ĝin konsentis ». (8. II. 1904).

Alia bonega rezultato estis preskaŭ tuj atingita : unu el niaj plej distingindaj samideanoj, hidrografa inĝeniero, S<sup>o</sup> Rollet de l'Isle, petis por maraj oficiroj permeson similan al tri jam donita al la teraj. Kaj, fakto rimarkinda, la tiama ministro S<sup>o</sup> Pelletan, al kiu oni ofte riproĉis proskrasti senfine la subskribon de oficialaj dokumentoj, eĉ urgaj, tuj ĝin surmetis sur favoran dekreton.

Sed la lokaj grupoj, dezirantaj varbi ne sole oficirojn sed ankaŭ soldatojn, vidis kontraŭstarigi malpermesoj de militestroj dirantaj : « La Ministro parolis nur pri oficiroj; ni ne povas toleri ke vi klopodu al niaj suboficiroj kaj soldatoj. »

Kaj tiel, estis kondukataj sin turni al Kapitano Capé kelkaj propagandistoj, inter kiuj S<sup>o</sup> Perrin, el Calais, kaj S<sup>o</sup> Baissac, el Constantine, kiu, en Alĝerio, estis vera leŭtenanto de l' Kapitano, mirinde batalanta en sia departamento.

La 22<sup>an</sup> de Decembro 05, la tiama militministro, S<sup>o</sup> Berteaux, sendis la jenan depeŝon.

La Milita Ministro al la Generalo komandanta la 19<sup>an</sup> korpuson de l' armeo en Alĝero.

Kapitano Capé, helpanto en la Artileria Direkcio de Alĝero, sendis al mi leteron en kiu li petas, ke la sub-oficiroj kaj soldatoj estu permesataj aniĝi en la esperantista grupo de Alĝer' kaj de Nord-Afriko.

La militistoj estas permesitaj, kiel la oficiroj, enviciĝi en la diversajn Esperantistajn grupojn; cirkulero rilata aperos baldaŭ en la Oficiala Bulteno.

Mi petas vin sciigi pri tio Kapitanon Capé.

Suskribita : MAURICE BERTEAUX.

Tiu estis la signalo de batalado agema, sed ne jam sufiĉa, en la kazerno, dum kiu S<sup>o</sup> Michaux, skribante al Kapitano Capé, est parolado antaŭ infanteria bataliono kaj ĉiuj garnizonaj oficiroj diris : « Estas ja dank' al vi, ke Esperanto estas en l' armeo ». (12. V. 1905).

Kaj je la Bulonja Kongreso, Kapitano Capé alvokis la atenton pri la graveco de la milita propagando daŭriganta la lernejan.

Sajnas ke tiu alvoko ne estas perdita ĉar, de la komenco de la Esp. militiro 1905-1906, la militaj klopodantoj duobligis siajn penadojn.

Antaŭe marŝas leŭtenanto Bayol, kiu fondis kursojn en du « Soldataj fajrejoj » (Vincennes kaj Versailles), kiu komencis la 1<sup>an</sup> de Junio serion da artikoloj en la belega milita ilustrato « Patria », kiu ankaŭ instigas en multaj « ĉiutagaj 'oj » artikolojn, en kiuj li insistas pri la graveco de Esperanto por militistoj, kiu, fine, preparas militan terminaron.

Tiun ĉi militan utilecon de Esperanto, elmontritan de Kapitano Capé en lia unua peto, ni resumos proksime. Estas efektive necesega ke niaj militaj kaj ne-samideanoj perfekte ĝin komprenu kaj pripensu por ke, je la momento de l' Kongreso, ili povu utile ĝin pridiskuti, kaj ekzameni la plej bonajn rimedojn por disvastigi Esperanton en la kazernojn.

OFICIRO.

## LASTHORE.

Niaj sinceraj bondeziroj al la baldaŭaj geedzoj (Teleg. adreso Marich-Bigler, Zimony, Hongrie).


## Granda ekspozicio

dum la Ĝeneva Kongreso estas organizata. Sendi kiel eble plej multe da dokumentoj : la grupoj kaj aliaj petu la specialan cirkuleron al la « Kongresa Oficejo, 15, Quai de l'Île, Genève » al kiu oni estas petata sendi, kiel eble plej frue, ĉion, kio koncernas la kongreson. Oni konsideras kiel valoraj nur la aliĝojn akompanatajn de la responda monsumo.

Progresemaj hotelistoj : Châlet Speranza, Frutigen, Oberland Bernois — Komforta hejmo — Kor, kaj par. Esp. « Tra la Mondo » legebla.

Pro sufiĉego de ŝtofo, kaj manko de spaco, ni devas prokrasti nian bibliograffian kronikon.





Lau « Australasian ».

ĈE LA KUREJO DE MELBOURNO.  
La alveno : Ekscitanta momento.

## La Melbournna Pokalo.

Esp. laŭ la ĉiutaga «MELBOURNA GAZETO», de JOHN BOOTH, M.C.E. (Aŭstralio).

LA POKALO. — VENKO POR «BLUA MAKULETO». — REKORDO SUPERITA. — BELA KURADO.

La « grandaj premioj de Parizo », la « Derby d'Epsom », estas sportaj okazaĵoj konataj tutmonde, almenaŭ nome. En multaj landoj ekzistas similaj gravaj ĉevalkuroj. Ŝategataj nacie. Dank' al nia malproksima korespondanto, fervora poresperanta batalanto, ni povas doni pentrindan kaj viglan priskribon de la « Melbournna Pokalo » pri kiu multe raportis bilde (per ilustraĵoj) la grandaj ilustratoj « The Leader » kaj « The Australasian », el kiu estas eltiritaj niaj ilustraĵoj.

La populareco de la Melbournna pokalo jaron post jaro, pli kaj pli kreskas. Ĝi estas la sola festo pri kiu la tuta Aŭstralio estas interesata. Hieraŭ la belega kurejo (hipodromo) estis homplenega. La ĉeestantaro estis malofte tiel multenombra, se nur ĝi iam atingis tian nombron, kiu povis superi 85.000, sed certe ne estis malpli granda. Malofte la vetero estis estinta tiel favora. Kiam ektagiĝis kun ĉielo plumbe griza, kaj nordvento tondra, multaj koroj senkuragiĝis. Sed antaŭ la matenmanĝa horo, la suno montriĝis, *bluaj makuletoj* aperis inter la plumbaj nuboj. Ĝi estis la antaŭdiro (angl. « Tip »; fr. : « Tuyau ») de la naturo. La mateno plene certigis ĉiujn esperojn. Vagonaroj kaj tramoj estis rapide plenigataj. La stratoj vibradis pro la piedbatoj de la rapidantaj ĉevaloj, kaj « ĉiaj vojoj alkondukis al » Flemington.

Longatempe antaŭ la tagmezo, la vastaj herbejoj kaj la amplekseĝaj pavilionoj komencis, kvazaŭ pro fina ordono, ekflori kaj fruktodoni.

La kurkampo ne povis esti pli vidinda. Laŭlonge de la stratoj de la urbo, turniĝe forblovita de la vento, nun la polvo ondolinie kuŝas. Kontraste kun tio, la vastaj herbaj ebenaĵoj, kun fontanoj bruetantaj centre de ili, estas kviete ripozigaj. Ĉarmega harmonio de koloroj estis farita de bone prizorgitaj florbedoj, kaj la girlandoj el grimpemaj rozarbetoj sur la paviliono parumis la polvoŝarĝitan aeron. La malpale verda foliaro, la bruniĝanta herbejo, la oraj flugiloj de la libeloj flugantaj tra la sukplenaĵoj, la fumo de la malproksima urbo, kiu sendas kiel purpura nebulo ĉe la limo de la horizonto, anoncas la alvenon de la somero.

Post ne longe la paviliono estis plena. La belegaj virinvestaĵoj donas al ĝi ĉielarkan ŝajnon. La monteto, poste staranta kiel dikega formikaro, kaj la ebenaĵo dense pleniĝis. La pasantaj ombroj sur la kontraŭan flankon pli videbligis la multajn *Piknik'*ajn grupojn. Sur la rivero, estis boatoj plenaj je plezurserĉantoj. Sur la bruna tapiŝo,



SUR LA HERBEJO.  
Grupo el Vetistoj.

sub la bono-  
doraj pinoj  
la vetgrupoj  
trovis sian  
klientaron.  
Ĝuste antaŭ  
la unua kuro,  
la registaro  
alvenis en  
luksaj vetu-  
riroj, kungaje  
ornamitaj  
kondukistoj,  
kaj eskorta-  
taj de la Mel-  
bourne Ka-  
valerio. Tio  
estas la pre-  
ludo de la  
« Pokalo. »

La vestaĵoj estis belegaj ; ĉiujare ŝajnas ke la antaŭaj elmontraĵoj ne povos esti superataj. Tamen tiel okazas. Ĉiuj ĉielarkaj koloroj malvolviĝas antaŭ la okuloj : paŝtela bluo, ostra grizo, emeraldada verde, cervidkoloro, flavbruno, ĉiaj specoj de violkoloro kaj palruĝo, kaj bruno, kaj flavo. . Simplaj kaj nefierigaj muslinoj staris brave apud silkoj agrable murmuretantaj (fr : froufrouter) kaj « crêpe de Chine ». Tiuj tagoj, kiam la koloroj iĝis nenatura dividajo inter la juneco kaj ĝia malo estas pasintaj : Sin vesti « mode » estas porti tion, kio al si taŭgas.

Ĉiu ŝtato, preskaŭ ĉiu civilizita regiono de la mondo estis reprezentata en la enfermaĵo. La oficiala mondo tie ĉeestis multenombra, ĉiuj profesi-anoj tie montriĝis : « Squatters » (ŝafpaŝtistestroj) de centra Aŭstralio, homoj de la « Snowy River » (Neĝa Rivero), ministoj de « Broken Hill » (Monteto Rom-pita), esploristoj de okcidento, terkulturistoj de Tasmanujo, sukerplantistoj de Queenslando, perlistoj de la norda tropiko kaj balenĉasistoj de la antarktika, « Ĝakeru-oj » (1) de la « Neniam-Neniam » a landeto (2), ŝaftondistoj de « la Condamine » kaj maristoj de la alia flanko de la tero.

Sed, en la selenfermaĵo oni renkontas la veran ĉevalamanton. En la apartaj ĉevalfakoj, kiuj ĉirkaŭas ĝin, estas la plej pursangaj (purrasaj) ĉevaloj, kiujn Aŭstralio povas naski. Kelkaj el ili valoras grandan riĉecon, kelkaj el ili finos sian vivon en la flanktimonoj de ia fiakro !

La ĵokeoj kure eniras en la fakojn kaj eliras el ili. La seloj estas taŭgarangitaj, la rimenoj estas streĉitaj, kaj ĉiuj aliras al la rekta vojo, dezirante sukcesi sed pretaj por la malvenko.

Sub la ulmoj la voĉbruado neniam ĉesas. Energie la vetprezoj estas kriegataj, kaj la bruego de la « Ring » (vetistaro) povas esti aŭdata de unu mejlo.

La antaŭpreparoj estas faritaj. La 27 ĉevaloj formas seninterrompan vicon malantaŭ la barilo. Tiu ĉi estas formetita. « Dong ! » sonoras la sonorilo. « Ll' ek-

for! » kriegas la homamaso. Granda silento okazas ĉe la kurkampo dum la ĉevalaro rapidkuras...


Jam dekduo da ili estas venkitaj; freneze galopas la ĉevaloj por bone loki sin. Tiam estis iom da ekpuŝo. La sorto de alia duondekduo estis decidita.

Tra la nebulo de varmo kaj de polvo, la koloroj de la ĵokeoj aperas kiel strioj ; kaj la longe detenata eksciteco ekmontriĝas : « Grand Rapids » gajnos, ekkrias voĉo, « Cauteen » proksimiĝas, ekkrias alia ; « Tartan, Tartan », ekkrias tria. Dume la favoritulo plimalgrandigas la interspacon. Tiam oni aŭdas « Marvel Loch, Marvel Loch », tiam sekvas malbelsonega serio da raŭkaj homblekoj : « Scot Free, Marvel Loch, Fabric, Tartan, Warroo, Blue-Spec (Blua Makuleto) dum la ĵokeoj rajdas kvazaŭ por kara vivo, ekscitante siajn ĉevalojn por algalopi hejmen. « Scott Free ! » muĝas parto de la amaso ; « Blue Spec ! » ekkrias la aliaj. Subite la koloroj de Tartan, la favoritulo aperas ĉe la ekstremajo rapidgalopante kiel uraĝano. La favoritulo ! la favoritulo gajnas ! ekkrias viroj kaj virinoj samtempe. Gi proksimiĝas al « Blue Spec », kiu pliproksimiĝas de « Scot Free ». Oni povus kovri la trion per tuko. La granda amaso estas freneze ekscitata « Tartan » ŝanceliĝas, ĝi ne gajnos... Dum momento la tri ĉevaloj sovaĝe batalas. Nur la hardeco decidigos la rezultaton; oni ne eĉ rigardas la aliajn ĉevalojn. La rajdanto de « Blue Spec » rapidigas sian ĉevalon ĝis la ŝultroj de « Scott Free », ĝis ĝia nazo. Nun unu superas la alian !

Per lasta belega penego, li donigas la tutan forton de la kuraĝa ĉevalo. « Blue Spec ! Blue Spec ! » tontras ĉe ĉiuj flankoj de la kurkampo. Nur en tiu lasta momento, la merito estas rekonebla. Tiam estis uragana aplaŭdo, kriegado pro ĝojego. En temprekordo « Blue Spec » gajnis la pokalon.

Kio estas la cetero de la ĉevalkuro ! Nur okazaĵo en bela sporta tago... Subiris la suno kaj rapide malpleniĝis la kurkampo. Lknoktiĝis ; supre estas blua ĉielo kun lunlumo dolĉa kaj brila, kaj ne kalkuleblaj steloj, kvazaŭ returnita sonorilo blua kun bluj makuletoj dissemitaj...

JOHN BOOTH  
el Melbourne (Aŭstralio).



SUR LA HERBEJO.  
Glaciajvendisto.

(1) Ĝakeru-vulgara kaj popola vorto-homo simpla kaj tute nescia pri la urba vivado, malpolurita kaj neklera, facile trompebla serĉe ; sed lerta kaj sufiĉe sperta pri la kamparaj aferoj.

(2) Neniam-neniam — bonhumora esprimo — tre malproksimege, kien oni neniam povas alveni.

(3) Ili ekforiras : angla interjekcio « The' re off. » t. e. « They are off. »

# Esperanto, nova Internacia Lingvo, trovas Adeptojn kaj Lernantojn en Urbo Nov-Jorko.

Dok<sup>o</sup> Max Talmey, Estro de la loka grupo, lernanta la lingvon elpensitan de Dok<sup>o</sup> Zamenhof.

ĜIA TUTA GRAMATIKO LERNEBLA EN UNU HORO.

JAM ESTAS CENTMILOJ DA LERNANTOJ, EL KIUJ  
MULTENOMBRAJ EMINENTULOJ EL LA TUTA MONDO.

Tiaj estas la titoloj de artikolo pri kaj por Esperanto presita la 22<sup>a</sup> de Februaro 1906 en « The Evening Telegram », posttagmeza eldono de l' fama « New York Herald », kun portretoj de l' komitatanoj de l' Nov-Jorka esp. grupo.

Laŭ nia scio, je la unua fojo ĉiutaga nacia ĵurnalo tiel videble montris, ke Esperantistoj meritas, ke oni atentigu pri ili; kaj la fakto estas tiom pli grava, ke Esperanto, ĝis nun, malfacile progresadis en Ameriko.

Ŝajnis do al ni diskoniginda tiu pruvo de l' bonega rezultato atingita de l' fervoraj amerikaj pioniroj. Tuj ni klopodis por haviĝi la originalan fotografajon, kies kopiaĵon malgrandigita ni povas enpresi hodiaŭ. dank' al la afableco de S<sup>o</sup> Carl Classen, ano de l' Komitato. Ni ĝin donas kiel ekzemplo sekvida, ĉiufoje kiam eble.

Nia kunlaboranto D-ro Gambier, resumis jene la artikolon.

La aŭtoro priskribas la historion de Esperanto de la komenco ĝis hodiaŭ. Li parolas pri la ĉiuspecaj malfacilaĵoj suferitaj de Esperanto, precipe pro la ridinda falo de la groteska Volapük. Li sciigas la staton de Esperanto en Nov-Jorko (oni scias ke ĝis tiuj lastaj tempoj, Ameriko estis tute malamika al Esperanto). La antaŭen movado estas komencita kaj certe ĝi daŭros kaj progresos, dank' al la energio de la komitato, kiu sukcesis fondi grupon.

La fino de la artikolo parolas pri la principoj de Esperanto, je kiu estas neniam esceptoj, kaj pri D<sup>ro</sup> Zamenhof mem.

Jen estas la traduko de la parto de l' artikolo resumanta la nunan situacion en Nov-Jorko.

## Esperanto en Nov-Jorko.

La Nov-Jorka societo estis organizata de D<sup>ro</sup> Max Talmey kaj S<sup>o</sup> Stephen M. Travis. Tre grandaj estis la malfacilaĵoj por fondi tiun societon. Dok<sup>o</sup> Talmey penis monatojn antaŭ

ol li povis varbi sufiĉan nombron da personoj fervore dezirantaj ellerni la novan lingvon. Kaj eĉ post la fondo de la societo multe da kontraŭaĵoj estis venkotaj.

Scienculoj kaj « faddist'oj (1) » aliĝis al la societo nur por ŝajni veraj Esperantistoj. Tial, ke la klubanoj ne deziris tiajn anojn,

ili aldonis la jenan reformon al la konstitucio de la societo:

« Ĉiu kandidato kiel ano estos devigata suferi ekzamenon montrantan ke li bone konas la elementojn de la Esperanta grammatiko. Tiu ekzameno devos okazi ne pli malfrue ol ses semajnoj post lia akcepto en la societo ».

« Ne pli malfrue ol kvar semajnoj post la unua ekzameno dua ekzameno estos postulata por montri ke li estas kapabla legi kompreneble Esperantajn tekstojn, kaj Esperanten traduki sentencojn de lia nasklingvo. »

La akcepto de tiu reformo, tuj malvarmigis la entuziasmon de la « faddist'aj » kandidatoj kiel anoj de la societo.



KOMITATANOJ DE L' NOV-JORKA ESPERANTA SOCIETO.

A. Dorj. J. Stedman. J. Kubik.  
C. P. Somerby. Dok<sup>o</sup> M. Talmey. M. Travis. C. Classen.

(1) Tiu vorto estas sendube populara (fr.: argot); eble ĝi signifas mokemulo, serctrompemulo.

« Ni nur bezonas seriozajn lernantojn diris Dok<sup>o</sup> Talmey, prezidanto de la societo, kaj ni preferas esti malmulte nombraj, ol havi liston plenan je mallaboremuloj. La Klubo estas organizita por helpi la Esperantistan kuzon en la Urbo kaj ni bezonas nur anojn kiuj laboros ĝis la fino. »

Nun la klubo konsistas el ĉirkaŭ dekdu anoj ĉiuj aktivaj; ili kunvenas ĉiun duan dimanĉon ĉe la domo de ilia prezidanto N<sup>o</sup> 62-West, 126<sup>a</sup> Street. La unua duono de la kunveno estas dediĉata por la aferoj de la klubo, la dua duono estas dediĉata por legi, traduki kaj paroli Esperanton.

La ĝenerala komitato komisiita pri la aferoj de la klubo konsistas el Doko Max Talmey, prezidanto; Jozef Kubik, vicprezidanto; Stephen M. Travis, sekretario; Alexander Dorf, kasisto, C. P. Somerby, Charles Classen kaj J. Stedman.

Se ia Nov-Jorkano interesiĝas pri Esperanto kaj deziras aliĝi al la societo en la urbo, letero al Dok<sup>o</sup> Talmey, havigos al li petpaperon.

### Esperantista Kongreso.

La plej granda antaŭen puŝo, kiun ricevis Esperanto okazis dum la lasta Aŭgusta Monato, ĉe la internacia kunveno de Esperantistoj en Bulonjo-sur-Mar (Franclando). Dek du cent delegitoj el dudek diferencaj landoj ĉeestis, kaj ĉio sukcesis de la komenco ĝis la fino, sen ia ŝanceliĝo. La Esperantista verda flago, kaj la Esperantista verda stelo ĉie montrigis, kaj ĉiuj kiuj portis tiujn emblemojn tuj fariĝis amikoj.

Kelkaj horoj apenaŭ antaŭ la terura tertremo ĉe San Francisko, skribis al ni So G. Gray: « Eble vi estos feliĉa eksciigi ke, en la Universitato de Kalifornio, en Berkeley, fondiĝis Esperanta Klubo ». Kompreneble, ĉar tio estas nova pruvo de la aktiveco ĵus preparolita.

Cetera la lasta n<sup>o</sup> de « l' Esperantiste » (n<sup>o</sup> 98 : 0 f. 30 c.) tute rimarkinda pri la propagandaj faktoj, enhavas gravajn sciigojn pri Esperanto en U. S. A., resumitaj ĉi sube:

Krom la *New-York Esperanto Society* ekzistas la *Amer. Esp. Asocio*, en Boston, kies sek. S<sup>o</sup> J. F. Twombly, sendis la sciigojn; *Harward Esperanto club*; *Everett Esperanto club*; *Portland Esperanto Society*; *Boston Esperanto Society*; *Esperanto club de la Technology club*, en Boston; *Blindula klubo en la Perkins Institution* en Boston; *Esperantista Sekcio de la Unuiĝo de l'eks-studentoj de la germanaj universitatoj en Ameriko*.

Same kiel en la Malnova-Mondo, la virinoj ne restas indiferentaj pri Esperanto; ekzistas *Virina Klubo de la Mass. Inst. Technology* en Boston, kaj kurso en *Wellesbury College*, Wellesley, Mass.

Cetera intereso sin montras en la superaj lernejoj *Massachusetts Institute of Technology*, Boston, Mass.; *Leland Stanford University*, Palo, Alto, Cal.; *Virginia Polytechnic Institute*, Blacksburg, Va.; *Rutgers College*, New Brunswick, N. J.; *Johns Hopkins University*, Baltimore, Md.

*Bataliŝipo Olympia*, U. S. Narry Yard, Norfolk, Va.

*Bibliotekisto de War department*, Washington, D. C.

La movado sin etendas ankaŭ en la sekvantaj urboj: *Buffalo* (N. Y.), *Detroit* (Mich.), *Saint-Paul* (Minn.), *Quincy* (Ill.), *Denver* (Colo.), *Los Angeles* (Cal.), *San Diego* (Cal.), *Providence*

### Nacilingva gazetaro.

En « *Internationalis Concordia*, bulteno de la Societo de internaciaj studadoj kaj korespondado, Esperanto, de la rimarkindaj artikoloj de l' eminenta kaj ĉiam bedaŭrata fondinto, Emile Lombard, ne ĉesas interesiĝi je nia lingvo, tiel taŭga por la celo persekutata de « I. C. » Nia bonega kunlaboranto, Sam Meyer, verkas ĉiumonate esperantan kronikon, dulingve, tute kapabla, vole nevole, esperantemigi la legantojn.

En la literatura fako samaj kontentigaj militiroj:

En « *Malta Letteraria* », S<sup>o</sup> Agostini Levanzini malfermis la Rubrikon Esperanto (Februara N.); nova itala revuo, literaturo kaj ilustrata « *Capitan Rompicollo* » komenciĝas sub aŭspicioj de nia lingvo per artikolo de nia malnova kaj agema samideano, Gr<sup>o</sup> Gallois, jam tre konata de niaj legantoj; la bonega flandra familia revuo « *De Lusthof* » (monata) daŭrigas kaj pliampleksigis sian fakon Esperanto. Kiam oni scios ke la revuo estas eldonata de l' presisto de « *Tra la Mondo* », S<sup>o</sup> Witteryck, unu el la plej malnovaj kaj lertaj belgaj samideanoj, ne estos necese diri laŭ kiu zorgo kaj beleco estas eldonata la revuo.

La « *Revue du Touring-Club* » franca enhavas ankaŭ, ofte, esp. skribaĵetojn. Fine, kun granda plezuro, ni vidis ke la poresperanta militiro de « *Juventut* » momente haltinta, rekomencis pli fervore ol iam.

La facileco je kiu fremduloj interparoladis estas preskaŭ ne kredebla. Okazis kunvenoj, kiel ankaŭ amuzadoj, paroladoj tute en Esperanto. La nova lingvo tie estis plej ĝuste provata, kaj ĝi fruntis kontraŭ tiu provo firme kaj konvinke. La kunveno pruvis sen ia dubo, ke Esperanto estas ne nur la plej facila lingvo en la mondo, sed ankaŭ la plej praktika...

Unu el la amikoj de la Imperiestro de Aŭstrolando diras ke li abomenas Esperanton, tial ke « kanajlaj anarhistoj, per gramatiko kaj vortaro, post duon dekludo da lecionoj povas fari sufiĉe la lingvon, por esti kapablaj interkomprenigi sin de ĉiu alia, en la tuta mondo. »

Tiu ĉi sinjoro, kiu estas Ambasadoro kaj klera filologo, nomas Esperanton « lingvo de Ŝtelistoj », kaj diras, ke tiu lingvo devus esti forigita kiel danĝero por la leĝo kaj por la paco en Eŭropo. Tamen, li konsentas ke la facileco je kiu oni povas ĝin elerni, enigas novan rimedon por la interrilatoj de la ŝtatoj kaj de la nacioj.

El « THE EVENING TELEGRAM ».

Tradukis Do GAMBIER.

Noto. — Estas vere domaĝe ke mi ne konas la nomon de tiu eminentulo, mi tuj proponus al la « Ŝtelistoj » kolekti monon per oferdonacoj por starigi al li altegan statuon. Oni ne povas esti pli afabla por la multenombraj honestuloj, kiuj estas fervoraj kaj konvinkitaj Esperantistoj, kiuj kredeble pli malfrue, pro Esperanto, fariĝos ŝtelistoj!

Do G.

### ĜENERALA MOVADO EN U. S. A.

(R. L.), *Andover, Fall River, Lexington kaj Lowell* (Mass.), *Norfolk* (Va.) kaj *Blackburg* (Va.), *Greenwood* (S. C.), *Worcester* (Mass.), *Colombus* (O.) kaj *Cincinnati* (O.).

Kiel oni ĝin vidas, Boston estas vere Esperantista Centurbo kaj la *America Esperanto Asocio* baldaŭ ludos tiel gravan rolon, kiel la *Brita Esp. As.*

Longaj artikoloj eliris en la sekvantaj ĵurnaloj: *Boston Sunday Globe*, *New York Evening Telegram*, *New York Tribune*, *New York Nation* kaj aliaj ĵurnaloj de Baltimore, Philadelphia, Norfolk kaj Los Angeles. Bonega artikolo en la monata revuo *Atlantic Monthly* (januaro). Alia eliros en la junia numero de *Ladies Home Journal*, monata ĵurnalo vendata je 500,000 ekzempleroj. Tiuj du artikoloj estas ŝuldataj al S<sup>o</sup> profesoro Albert Schinz, malvano amiko de Esperanto, en Bryn Mawr College, Bryn Mawr, Pa.

Fine, la *Christian Endeavor World*, ĉiusemajna ĵurnalo de la *Christian Endeavor Society*, kiu eliras daŭre ĉiusemajne po 100,000 ekzempleroj, enhavas, en la numero de 5 aprilo lasta, artikolon longan je plena paĝo pri Esperanto kaj verkitan de l' P<sup>o</sup> de l' Societo, Rev. D<sup>r</sup> F. E. Clark. Li tre aplaudas Esperanton kaj konsilas al ĉiuj personoj la ellernadon de nia kara lingvo. Li mem, kvankam maljuna, penadas ĝin elerni. Plie li sciigas la legantojn, ke alia sinjoro, grava persono en la konsilantaro de la Societo, jam veturis Londonon, por sin perfektigi en Esperanto tiamaniere, ke li povu kontentige prezidi la Esperantan sektion, en la monda kunveno de la *Christian Endeavors* okazonta la proksiman someron en Genevo. Ni instigas nian legantaron diskonigi, nacilingve, tiujn sciigojn de nia franca kunfrato.

La Artikoloj en la ĵurnaloj estas tro multaj por ke ni povu raportiri pri ili. Ni signalu tamen iajn aperintajn en la gravaj Parizaj folioj: « *Le Gaulois* », « *Le Petit Journal* », « *Le Journal* », « *Le Petit Parisien* », inspirataj de nia agema milita propagandisto: L<sup>o</sup> Bayol. Ankaŭ en « *L'Eclair* ».

Ni citu ankaŭ gravan artikolon el « *Die Zeit* » el Vieno, de l' fama scienculo Ostwald, el Leipzig, Esperante presita en nian bonegan kunfraton « *The British Esperantist* ».

### Movado Esperantista — Mallongaj senperaj sciigoj.

S<sup>o</sup> A. Barton (*Sheffield, Anglujo*) malfermis kurson en la Klubo Socialista (Independent Labor Party). Pr<sup>o</sup> kaj lernantoj dezirus korespondi (338 Walkley Bank).

S<sup>o</sup> Douglas Buchanan (*Glasgow, Skotlando*) nia sindona propagandisto, raportis en « *The Evening Times* » (12. IV. 06) pri grava kunveno okazinta en la « Reĝa Filozofia Societo de Glasgow », kun helpo de D<sup>r</sup> R. J. Lloyd, el Liverpool, D<sup>r</sup> James Knight, kaj S<sup>o</sup> Buchanan, kiu bonege sukcesis.

D<sup>r</sup> Busutil (*Misido, Malto*) nin skribis « ke la Edukofico, en Malto permesis la enkondukon de Esperantaj kursoj en la Universitato. Elementaj senpagaj kursoj baldaŭ komencos. Obstine antaŭen! » Jes, kaj brave al la valoraj amikoj, kiuj atingis tiun gravan rezultaton.

S<sup>o</sup> John Keating (*Campinas, Brazilujo*) fondis grupon esp. en tiu ĉi urbo, sub la nomo « *Suda Stelaro* ».



# Cirkaŭ la Kongreso.

Pastro Schneeberger, tre konata en la stenografia mondo per la «Lernolibro de Esperanta Stenografio (sistemo Stolze-Schrey)» eldonis novan verkon, kiu multe interesos la Esperantistojn. Ĝi estas la Detala Raporto pri la oficialaj paroladoj, diskutadoj kaj decidoj de la Bulonja Kongreso.

Ĉiuj kiuj ĉeestis la Kongreson memoras la diligentecon laŭ kiu S<sup>o</sup> Schneeberger skribis, senlace, ĉu apud tablo staranta sur la teatra scenejo dum la kongresaj kunsidoj, ĉu sur mem-orlibreto en aliaj cirkonstancoj. La rezultato de tiu aktiveco estas nun videbla per la ĵus citita verko. Estas vere interese kaj agrable relegi en ĝi la paroladojn kaj kongresajn pridisputojn partoprenitajn kaj, persone, mi multe admiris la ĝustecon laŭ kiu P<sup>o</sup> Schneeberger notis la alparolon de S<sup>o</sup> Montrosier dediĉitan al la ĝusta kunulino de nia kara Majstro.

Kaj vere, tiu ĉi libro, tiel rekomendinda al la kongresintoj kaj, cetere, al ĉiuj Esperantistoj, estas mirinda pruvo de la alfarebleco de Stenografio al Esperanto. En la komenco de la libro kuŝas repredaĵo de l' eltirajo stenografiita de la malferma parolado de D<sup>o</sup> Zamenhof, eltirita el «Tra la Mondo».

Mirinde plenas tiu verko, la ĵus aperinta «Albumo de konataj Esperantistoj». Ĝi enhavas pli ol cent portretojn de Samideanoj kun, komence, klariga teksto tre zorge verkita de l' aŭtoro, S<sup>o</sup> Fritz Schuck.

Mi pasigis ja agrablajn momentojn legante la «Detalan Raporton», dum kuŝis sub miaj okuloj la portretoj de l' oratoroj. Inter ili estas la ĉefaj poresperantaj batalantoj, societ = kaj grupestroj, redaktoroj de revuoj, anoj de l' «L. K.»

Kaj, same kiel mi plezure rimarkis en la anoj de tiu ĉi «L. K.» multajn kunlaborantojn de «Tra la Mondo», same, ankaŭ, mi kalkulis ke, inter ĉirkaŭ cent tutmonde famaj Esperantistoj, estas ne malpli ol 31 kiuj partoprenas en la redaktado de «Tra la Mondo»! Cetere, niaj legantoj povis jam juĝi ke la plimulto de niaj aliaj kunlaborantoj estas indaj havi lokon en 2<sup>a</sup> libro de konataj Esperantistoj. Varmege ni deziras ke la sukceso de l' 1<sup>a</sup> ebligu tian eldonon. (1)

Certe ĉiuj Genevaj kongresantoj volos posedi la albumon de S<sup>o</sup> Schuck ĉar, tien alvenante, ili jam konos vide multe da la homoj, al kiuj iros la rigardoj.

La preparado de la Kongreso estas aktive prizorgataj: «la kunveno en Olten, kiu okazis la 16<sup>an</sup> de Aprilo mirinde sukcesis», skribis al ni Pastro Schneeberger, la sindona prez<sup>o</sup> de la S. E. S., kaj havos grandan signifon en la Kongresa programo.

La organiza komitato, siaflanke, ne estas neaktiva: nia kunlaboranto, S<sup>o</sup> Gabriel Chavet, sek<sup>o</sup> de l' O. K., pasigis 15 tagojn en Genevo por helpi la lokajn organizantojn; la 28<sup>an</sup> de Aprilo, ĝi donis grandan vesperfeston por altiri la atenton al Esperanto. La Parizaj gazetoj favore parolis pri tiu festo, ĉe kiu ĉeestis multaj eminentuloj.

En la programo, lerte ellaborita, troviĝis paroladoj de S<sup>o</sup> Carlo Bourlet, pri Esperanto, kiu ne povis okazi pro malsaneto de l' parolanto kaj Th. Cart, pri Esperanto ĉe blinduloj, kiu multe interesis; deklamaĵoj kaj kantoj france kaj Esperante. Inter tiuj lastaj, de nia majstro: «La Espero», muziko de F. de Ménéil; Ho mia kor! muziko de S<sup>ino</sup> Guivy; «La Espero», muziko de H. de Coppet, en kiu la aŭtoro aŭdigis sian belan voĉon; «Flugintaj Revoj» de l' tiel konata poeziisto A. Grabowski; «En monto» de alia delikata poeto, H. Sentis; «La muŝoj» sprita monologo de Th. Cart.

Fine «Le fluide de John», komedio de Hennequin, bonege tradukita de S<sup>o</sup> H. Huet, la direktoro de l' kursoj de l' Pariza grupo, permesis al la elekta aŭdantaro juĝi la belsonecon de Esperanto

(1) 2 f. 30, afrankite, ĉe S<sup>o</sup> Fr. Schuck, 16 Thomastrasse, Braunschweig (Allemagne) — 2 f. 40 ĉe «Tra la Mondo».

kaj la similecon de la elparolado de diverslingvanoj, ĉar la 3 roloj estis ludataj de Ruso: S<sup>o</sup> Kolowrat; Katalano: S<sup>o</sup> Pujula y Vales; Franco: S<sup>o</sup> Crosset. Franca komedio de S<sup>o</sup> de Ménéil, plaĉe montris al la ne esperantistoj la voloron de Esperanto.

La sukceso estis tre granda kaj la festo atingis sian celon, kiu estis precipe: atentigi la gazetaron pri la Kongreso.

La programo de tiu ĉi estas alloga; jen ĝi:


- Mardon, 28<sup>an</sup> de Aŭgusto, vespere: Oficiala Malferma Cereemonio kaj Koncerto.  
matene: Preparaj kunvenoj, posttagmeze: 1-a Ĝenerala kunveno, vespere: Teatra Vesperfestoj.  
Ŝipveturado sur Lemana Lago, kun oficiala Festeno en Vevey (Festenkarto: 5 franĝojn).  
Vendredon, 31<sup>an</sup> » matene: 2-a Ĝenerala kunveno, posttagmeze: Akcepto ĉe l' Parko de S<sup>roj</sup> Thudicum, en «La Châtelaine», vespere: Ballo.  
Sabaton, 1<sup>an</sup> de Septembro, posttagmeze: 3-a Ĝenerala kunveno, vespere: Oficiala Ferma Cereemonio kaj Koncerto,  
3<sup>an</sup>, 4<sup>an</sup>, 5<sup>an</sup> » vojaĝo tra Svisujo: Genève, Montreux-Oberland, Spiez, Interlaken, Mürren, Berne, Genève.

Estas tre dezirinde ke multaj personoj, esperantistaj kaj ne, ĉeestu la kongreson. Kaj vere, tio estos nenia *ofero*! Ni ne bezonas longe paroli pri la admirindaj naturaj belaĵoj de la regiono ĉirkaŭanta Genevon, ĉu Francujo, ĉu Svisujo.

La Kongreso estos okazo vojaĝi laŭ tre favoraj kondiĉoj kaj la fervojaj kompanioj faros seriozajn rabatojn, kiel por la Bulonja Kongreso. Aliparte la kongresaj kartoĵoj estas ne kostaj: Verda karto (10 fr.) donas rajtojn ĉeesti kaj voĉdoni ĉiujn kunvenojn; partopreni en ĉiuj festoj, ankaŭ en la ŝipveturado; ricevi ĉiujn kongresajn dokumentojn.

Blanka karto (5 fr.) aĉetebla de ĉiu persono posedanta jam verdan karton, por unu ĝis tri anoj de sia familio.

Tiu karto donas la samajn rajtojn ol la verda, esceptinte tiun voĉdoni kaj ricevi la dokumentojn. STELETO.



EKSTERORDINARA ĜENERALA KUNVENO DE S. E. S. EN OLTEN, EN LA HOTELO «AARHOI».

		2	4			8	10	11	12	15	17	19	20	23					
1	3	5	6	7	9	13	14	16	18	21	22	24	25	26	27	28	29	30	31

## Eksterordinara ĝenerala kunveno de la S. E. S. en Olten.

Laŭfon: 18 — Pastro Schneeberger, Prez<sup>o</sup> de S. E. S.; Genève: 30 — L<sup>ro</sup> E. Mallet, Vic-Pr. de S. E. S.; 7 — L<sup>ro</sup> A. M. Boubier, Pr. de la loka org. kom; 28 — E. Privat, ĝen. Sek<sup>o</sup> kongresa; 31 — Dubois, Sek<sup>o</sup> de Soc. «Stelo»; 13 — P. Berthelot, red. de «Esperanto-Jurnalo»; Basel: 11 — Fr. Wenk, Stad. gr-prez.; 24 — Waller Lehner, kas.; 1 — Schoenmann; 5 — Fr. Wenk-Rüttler; 12 — Ernsi Jecker; 15 — H. Tanner; Bern: 16 — Jes. Feierabend, Pr.; 17 — D<sup>ro</sup> A. Brüstlein, nacia konsilano; Oberburg (Bern): 2 — Kreis; Solothurn: 4. Prof<sup>o</sup> G. Coray, Pr.; 6 — Fr. Wallther, sek.; 10 — J. Affolter; Neuchâtel: 14 — J. Wenger, Pr.; 8 — H. Stroele, Sek.; Erlinsbach (Aargau): 9 — Wyler; Winterthur: 25 — Prof<sup>o</sup> A. Späti, Pr.; 20 — Gust. Schwengeler, Sek.; 21. 22. 23. Deligitoj; Zürich: 26 — K. A. Janotta, Sek.; 29 — Karl Jost, kas.; Paris: 179 — Gabriel Chavel, Sek. de C. O.; ? : 3, 27.



# DIVERSAĴOJ



## La Vivado de Teoplantisto en Hindujo

Verkita de Li mem.

### Pri la Teo.

La propra hejmo de la tearbo estas la ĵunglo, kie ĝi atingas grandan altecon. Sed por plibonigi la kvaliton kaj faciligi la deprenadon de la folioj, oni malpermesas altecon de pli ol 2 metroj en la plantejoj; plue, dum la varmeta sezono — de Decembro ĝis Marto — oni suprehake malpligrandigas ĉiun arbeton ĝis amplekso de nur unu metro aŭ malpli.

Dum Aprilo, la teujoj ekkreskas, kaj de tiam, la tuta ĝardeno — po unu aŭ du sekcioj ĉiutage — estas senfoliigita post ĉiu

trovas ĉu sur la ĝardenovojo (vidu paĝon 121<sup>an</sup>), ĉu inter la teujoj, ĉu apud niaj domoj. Antaŭe, kiam mi devis ĉiutage viziti unu el la subĝardenoj, mi tre ofte — tro ofte — ekvidis ke mi ĵus rajdas sur la nov-faritaj postsignoj de la « Virmanĝulo ».

Ĝi estas tiel saĝa ke, malgraŭ la grandaj ĉasadoj, kiujn per elefantoj faras la Eŭropanoj de tiu ĉi regiono; malgraŭ la veneno, kiun ni enmetas en la malvivuloj; malgraŭ la kaptiloj, kiujn ni konstruas, kaj la noktaj subitaj eliroj en la ĵunglon, kiujn ni entreprenas; — ĝis nun ni ne povis lin mortigi, eĉ trovi! Ĉu ĝi estas besto aŭ diablo?

Pro tio, la ĝardena laborado estas nuntempe tre malfacila. Ĉiutage ni devas restigi kelkajn elefantojn apud la laborantoj; kaj 5 viroj, batante tamburojn, devas ĉirkaŭe promenadi. Tiamaniere, tagon post tago, la tefarado progresas!

### En la Varmeta Sezono.

De Decembro ĝis Marto, tempo de perfekta vetero, ni restas iom libertempe. La dise loĝantaj Eŭropanoj, en tiu ĉi sezono ofte kunigas por sportadi. Eu Asamo la ĉevalo partoprenas en ĉiu sporto inter la Angloj. Mi sekvigis priskribaĵon pri unu el iliaj plej vidindaj amuzajoj: Ĉevale kunfaru kurson, je la fino de kiu, levigu, per bastoneto, Hindan kruĉon kiu troviĝas sur la tero: tiam refaru la saman kurson al la ekirejo. La antaŭa alvenanto, *kun kruĉo*, estas la gajnulo (vidu ilust.). Oni ebligas, eĉ por la



Kopirajto.

JUGIA, TIPO DE BENCALINO.

daŭro de 9 aŭ 10 tagoj Tial ke oni prenas nur la plej novajn, la plej suprajn folietojn, la arbetoj grade pli grandigas ĝis la fino de la kreskado en Decembro. Dum « la Pluvegoj » (de Aprilo ĝis Okt.) preskaŭ ĉiutage pluvas, sed intertempe sunbrilas; ĉiam varmegiĝas, simile al varmo de laveja vaporo. Pro tio la novaj folioj elkreskas kaj rekreskas rapide.

La folian kolektaĵon oni lasas en aerumejo por ĝin sensukigi. Post kio ĝi estas maŝine kunrulata kaj tavole lasata en malvarmejo por fermenti. Fine, per hejtmaŝinoj oni ĝin sekigas; kaj pakas por la forsendo.


### La Virmanĝulo.

De longe la ĝardenanoj timegas pro granda Tigro, kiu en unu jaro mortigis 20 homojn, ĉu vilaĝanoj, ĉu kulioj. Ĝi estas tiel kuraĝa ke, iafoje, ĝi atakas la laboristojn tage; aliafoje ĉe la loĝejoj, nokte, tute nezorgema pri la ĉeestantoj kaj la lanterno kiun, nokte, oni nepre portas. Ĝiajn piedsignojn oni ofte



Kopirajto.

LA ĜARDENO LABORADO.



Kopirajto.

SPORTO POR LA EŬROPEANOJ.



Kopirajto.

SPORTO POR LA HINDAJ ĈEVALISTOJ.

Hindaj ĉevalistoj fari kursojn por premioj (vidu ilustr.). La mondo bonkonas la sportemecon de la Britanoj.

**Mia vivado.**

De tiam, kiam mi alvenis ĉi tien, pasis 1 1/2 jaroj. Mi nun povas paroli kaj skribi ambaŭ Asame kaj Bengale. Sed la mia estis la laboro ĉar miaj kolegoj ne povis — aŭ ne volis — ŝpari la tempon por instrui min. La ĝardena lingvaĵo estas malbona miksaĵo de kvar lingvoj Hindaj, kaj komence prezentis al mi multe da malfacilaĵoj.

Mi jam suferis pro la sunfrapo, la timinda febro kaj multe da ĉevalrajdaj malfeliĉoj. Dum « La Pluvegoj » mi fariĝas mangaĵo por la kuloj (moskitoj); kaj dum la tuta taglumo — krom tri horoj je la varmeĝo de la tagmezo — mi devas ĉeesti la kuliaron: foje mi ankaŭ nokte laboras. Vere la vivado sur tiu ĉi ĝardeno estas severa: sed se oni povas venki tiajn malfeliĉaĵojn, oni sendube hardiĝas.

(Fino).

Originale verkita kaj ilustrita de ALFRED T. SIMPER, Calcutta (India).

**Saluto al la Verda Stelo.**

R. DESHAYS.

Brilu sur ni, ho verda stelo, Restu tere, ne flugu for!

Kanto  
ka  
fortepiano.

*Malrapide.*

ne trans nuboj la nia celo: astro, gvidu koron al kor'!



## La flambrulaĵoj de Sankta Jozefo.

### VALENCIA TRADICIO.

Valencio estas urbo tre festema. Ĝiaj sunriĉeco, dolĉa vetero, blua ĉielo, verda kaj tro plena kamparo, kiu estas vastega, ebena, kiel senlima maro, enhavanta nekalkuleblajn vilaĝetojn simile al insularo grandnombra; la kantado de la multaj birdetoj gaje traflugantaj en la aero, aŭ sidantaj sur la branĉoj de l' foliplenaj arboj, la parfumo de l' bonodoraj floroj, kiuj ĉie sin trovas, kreskantaj preskaŭ sovaĝe; la malforta plaŭdado de la ruliĝanta akvo, kiu fluas kaj fruktodoniĝas la bedaron, faras el ĝia tero, ĝardenon; el ĝia klimato, preskaŭ neŝanĝeblan printempon; el ĝiaj loĝantoj... laboremulojn, jes! sed tro kutimitaj de longe al intertempetaj laborĉesoj, tio estas fermi la laborejojn, kaj ĝoje elpensi aŭ aranĝi spritajn amuzaĵojn.

Unu el tiuj ĉi, estas la flambrulaĵoj de Sankta Jozefo, laŭ Valencia dialekto «*Falles de Sen Ĝusep*», la deknaŭan de Marto.

Kelkajn tagojn antaŭ la dirita dato, jam la knaboj trairas la stratojn de la urbo, kolektante brulaĵojn por la grandaj flamfajraĵoj, kiujn la popolamaso atendas entuziasme, kaj kontentiĝas kriadante la antikvegan rekantaĵon «*Una estorela velleta pera la falla de Sen Ĝusep, el tio Pep*» (t. e. Unu mateton malnovan por la flambrulaĵo de Sankta Jozefo, onklo Jozef.)

La okazo prezentas kaŭzon por liberigi la domojn je sen-uzaĵoj, malutilaj kaj malnovaj mebloj. Ilin ricevinte la knaboj daŭrigas sian amuzaĵon, penante alporti al la flambrulaĵo de sia strato aŭ stratgrupo, la plej grandan kvanton da fajrolig-naĵo.

Antikve la festo estis simpla. Kaj konsistis nur el la bruligo de la troaj lignaĵetoj, kiujn faris la ĉarpentistoj, je la honoro de sia patrono la glora patriarko. Poste, starigis la kutimo aldoni al la flambrulaĵoj figuraĵojn, kiuj estis ĵetataj en la flamojn, aŭ alpendigitaj super ili per ŝnuroj inter la balkonoj. Pli poste, oni pripensis forni tabularon, kaj starigi sur ĝin la figuraĵojn. Perfektigante unu kaj alian, oni alvenis al la nunaj flambrulaĵoj, kiuj multfoje estas artaj verkoj, kies bruligon oni bedaŭras.

La fajroligno estas metata malsupre de l' tabularoj, kiu formas la plej diversajn kaj spritajn piedestalojn aŭ scenejojn. La starantaj figuraĵoj prezentas simbole nuntempaĵojn (personajn, politikajn k. t. p.), pro kio la estraro estas devigita, ofte, malpermesi aŭ aliformigi la flambrulaĵojn, kies moko estas tro travidebla kaj ofendas la personojn aŭ la instituciojn de ĝi aluditajn.

La vesperon de la deksepa de Marto, la flambrulaĵemuloj, tute entuziasmaj kaj gajaj, preparas la erojn de la lumfajraĵoj kaj starigas tiujn ĉi, lumigante per torĉoj aŭ kandelegoj. Je la tagiĝo, jam la najbaroj de la stratoj kie staras flambrulaĵoj estas vekitaj de la gaja sonorado, kiun disvastigas, per dancotamburoj kaj marokaj flutoj, la originalaj ludantoj de tiuj ĉi muzikiloj, restaĵoj de l' araba regado.

Kurioze komencas frue viziti la flambrulaĵojn, la servistinoj kiuj aliras al la vendejo, la oficistoj, lernantoj, kuracistoj, metiistoj k. t. p. kiuj estas devigataj pro siaj aferoj eliri matene el sia hejmo, rigardadante kaj komentariante ĉiun flambrulaĵon, kaj ĝian klarigadon, kiu estas farita per afiŝoj, sur ĝia piedestalo mem, aŭ sur la proksimaj muroj; tiuj afiŝoj eltenas versfaraĵojn dusignife vualitajn, kaj hierogrifojn ilustritajn, kies kaŝita signifo montras la spriton de l' flambrulaĵemuloj, dum la knabetoj krias senĉese « broŝuretoj pri rilato kaj klarigado de l' flambrulaĵo, po dek centimoj ».

Posttagmeze, la tuta popolamaso promenas kaj rigardas la flambrulaĵojn, ĉirkaŭ kiuj oni ludas muzikon.

La urbestro kaj la societoj valenciaj kiel «*Lo Rat Penat*» («*La Vesperto*») oferdonas premiojn al la flambrulaĵoj plej bonaj, plej riĉaj kaj plej spritaj. Por tio, kaj ankaŭ por vidi ĉu la ordonoj de l' estraro pri l' argumentoj de la flambrulaĵoj estas plenumitaj, specialaj komitatoj vizitas ilin, kaj juĝas pri la afero.

La sekvantan tagon, la tagon de la Sanktulo, daŭras la spektaklo kaj, dum la vespero, estas la flambrulaĵoj bruligataj kun ĝenerala ĝojado.

X. X.

*El Valencio (Hispanujo).*





C Oxenford

Ho! Ĉu tio estas ebla? Ekvidante la titolon de mia artikolo, niaj karaj samideanoj faras grimacon kaj plialtigas la ŝultrojn en maniero tre klare signifanta: «Kiom senutila estas tiu ĉi paĝo!» Fi! malam... = Haltu, mia plumo, ne skribu tiel malflatemajn adjektivojn; ĉar vi scias ja, ke la bonkoreco, l' indulgemo karakterizas la belmovan sekson, sekve mi volonte pardonas tiun malŝaton al miaj linioj. — Sed kion do mi intencis diri? Ha! mi memoras. Fi! sinjoroj anstataŭ montri malbonhumoron, vi devas kontraŭe fari rideton al Roksano; ĉar estas nekontraŭdireble, ke la vidiĝo de elegantulino ĉiam ĉarmas viajn okulojn. Kaj poste... kaj poste... ŝajnas al mi, ke la Virina paĝo estas nia apartenaĵo, kaj ni havas rajton pri-trakti ĉiujn plaĉantaĵojn al ni.



Jes, samideaninoj, ni havas tian rajton, tial ke esti bone vestita en la tuta senco de l' vorto estas nia devo. Ĉu Georges de Peyre-brune ne diris: «La virino devas sian belecon al la homa vido.» Kaj kiu neos, ke bongusta tualetto havanta tiun signon de propra eleganteco, kiu estas unu el la ĉarmoj de la virino, beligas malbelulinon? Do, ni uzu nian rajton, plenumu nian devon kaj parolu pri la nuna modo.

La tualetoj laŭ la modo de l' Imperio kaj de la Direktorio kreitaj de kelkaj mult-famaj tajloroj por Sinjorinoj naskis la rob-on-princinon tre ĝustalfaritan, la jupon-korseleton ĝuste desegnantan la talion, kiun la ĝuste oni fik-sas per ŝelkoj aŭ ne sur bluzojn silkajn, puntajn, batistajn; kaj kun ili, la necesegan eron de moda kostumo, la hispanan jaket-eton: la boleton. Ĝi havas adorindan karakteron, tiu malfeli-ĉa bolero, kiun ni

mortigas ĉiuduonjare kaj, kiu ĉiam revenas plaĉa, ĉarma, eleganta por prezenti al ni siajn agrablajn servojn. Varmege ni danku ĝin, ĉar, dank'al ĝi, ni havos belegajn tualetojn.

Oni metas multajn garniturojn sur la jupejn: ŝtofojn oblikve tonditajn, puntojn de Valenciennes, brodaĵojn formantajn zig-zagojn, festonojn, k. c. Multnombrajn falbaletojn, kelkafoje ĝis ok, dek, dek-du.

De kelkaj jaroj ni streĉis ĉiujn niajn fortojn por plilongigi nian bruston, kaj la kaprica modo, kies fidelaj kaj feliĉaj sklavinoj ni estas, havas nun nur unu celon: mallongigi la bruston per tre largaj zonumoj tute ne eltranĉitaj.

Plej plene triumfas la mallongaj manikoj. La triklarone longaj havas grandan sukceson. Nepe, kun ili, la ĉirkaŭbrakoj reaparas.

Ĉitindaj la largaj silkaj skarpoj multkoloraj, kiuj ornamis la junecon de niaj patrinoj, kaj la skarpoj el silka muslino, kies ekstremajoj estas tiel riĉe ornamitaj.

Mi ne forgesu la tre mallongajn paltojn-sakojn, kiuj tre ĝuste memorigas pri la vestaĵoj tute ne ĝustalfaritaj de niaj avinoj.

Tiun ĉi sezonon, la insektoj — pulo, majs-karabo, k. c. — donis al ni la modajn nuancojn.

Por niaj ĉarmaj legantinoj, mi donas modelojn kreitajn de la grandfama tajloro Bachwitz kaj ĵus elirintajn en la multvalora ĵurnalo «La Mode Parisienne» (La Pariza Modo), 37, avenue de l'Opera, Paris.

La modelo unua por juna fraŭlino estas rava tualetto tre moda el blanka batisto kun broditaj pizoj ornamita de punktoj de Valenciennes.

La alia estas tre koketa modelo kun bolero nomata kostumo-tajloro agrablega por la mateno, la aĉetoj, la vojaĝoj, k. c. el somera drapo aŭ el tolo. La jupo-korseleto konsistas el kvin partoj; oni butonumas ĝin sub la antaŭaj faldoj.

ROKSANO.



# FELIETONO

## La Torento el Saŭmo

Originalo de DANIEL LESUEUR (Francujo) (S<sup>vo</sup>).

### Tro da klareco super amema mistero.

Tamen li pensis nur pri unu afero: ne komprometi Veronikon. Tiucelen, nenio estis ebla, se ne daŭrigi sian marŝadon, tuj irante super la domon, kiel turistoj kiu atingus la ponton kaj la groton de la Lakta Rivero. Tiuspeca ekskurso estis malmulte verŝajna je tia horo. Tamen, kelkaj gvidistoj de l' lando fanfaronas, ke ili povas konduki vin ĝis l' interna lago, kiam la torento estas seka, kaj tiu promenado kun lumiloj en kaverno ne postulas grandan taglumon. Por la supreniro, Anglo stranga povas preferi la noktan malvarmeton. Se Jako estus suspektata, sed ne rekonita, li per tiu taktiko erarigus la fraton Aliparte, li ne povis elekti. Ĉio estis pli preferinda ol malsupreniri nun al la vilaĝo informita, kie l' obstina radio lin vidigus al tro da rigardoj avertitaj kaj malicaj.

Por eviti la domon de Nello, la kompatinda amanto, ĉagrenigita de sia malsprita aventuro, ekrampis iom hazarde, riskante rompi sian kolon. Mallarĝa pasejo, inter du vinberejaj kvadratoj subtenataj de ŝtonoj, ebligis, ke li iru super la malpermesita loĝejo. Je momento, li konsciis, ke li ĝin lasis malsupre, dekstre. Ĉar, tie, li rimarkis ombran truon, en kiun li povus rifuĝi, ŝirmata kontraŭ l' infera lumo. Li evitis tion fari. Tiu ombro estis l' ombro de l' dometo. Tie la radio finiĝis. Sed la fakto mem, ke Jako ne troviĝis en la malluma konuso, kaj restis antaŭ la rigardo de siaj persekutantoj, trankviligus sendube, almenaŭ pri liaj tujaj intencoj, la suspektan frenezecon, kiu lin spionis de l' profundegajo, — kiu lin spionis per tiu timiga lumokulo.

Tio estis kion li deziris. Dum momento li haltis. Iom pli kvietaj, li povis aŭskulti sian koron. Lia korbato ne devenis de l' spirego. Sed senti sin tiel proksime al Veroniko!... Por la tre juna viro kiu estis Ferneuil, la ekscitaĵoj de tiu ĉi vespero igis pluan instigilon. Se la mortigaj minacoj de Nello estus celintaj nur li, li estus tuj forlasinta ĉiun singardemon. Lia rigardo direktis sin malsupren al la mistero de mallumo en kiu sin kaŝis lia revo. Blindigita de lumeco, li tie povis vidi nenion. Sed ŝi, Veroniko, vidis lin. Certe, la malfeliĉulineto, maltrankviligita de l' stranga farmaniero de l' lumjetilo, estis rapide serĉinta kaj trovinta la kaŭzon de tio. Kion ŝi pensas? Ĉu ŝi tremas?... Por si mem? Por li?... Almenaŭ ŝi nun scias, ke li ne povis forgesi ŝin.

Sed kial ne paroli al ŝi? La plej potencaj maraj lornetoj ne vidus la movon de liaj lipoj. Kio ajn okazos, li kriis:

Veroniko!.....

Li kredis aŭdi petegon, doloran voĉon — ho! tiel multe plenda, ekster la nedistingebla spaco de l' himera nokto, kaj pro kiu li strange ekstremitis en sia fulmoplena soleco.

Unu sola vorto alvenis al li:

Morti!

### Sovaĝa gardanto de l' familia honoro.

Lia tuta korpo ekstremitis. De kia preĝo dependis la funebraj silaboj: « Morti ». Pasia korpremo sublevis la junulon. Tre rapide li denove ekmarŝis, alvenis al la vojo laŭiranta la kuŝojn de l' torento, atingis la lignan ponton, iris al l' alia bordo. Ĉiam la lumo sekvis lin.

Malgraŭ lia vira kaj fortika juneco, la laceco, la malfortiĝo ekkaptis lin. Ĉio estis surprizo aŭ insido dum tiu kurado, en la daŭro de kiu li nenion vidis trans kelkaj metroj. Kiu scias, ĉu li tuj ne falos en embuskon? Signalo de l' akcizistoj al aliaj kamaradoj de ia najbara posteno, kaj li vidus aperiri virojn tre malbonintencitajn. Matteo Nello rapide atingos ilin, kaj tiam?... Ĉu la funebra vorto elparolita de Veroniko ne estis avertita? Por aldoni al lia malkvieteco, hajlo subite ekfalis. Nuboj estis amasiĝintaj de l' momento, kiam li ne plu vidis la ĉielon. La vivaj strioj de l' hajleroj tra la blanka lumeco, kaj ilia kvazaŭa vipbato sur lia vizaĝo finis senkuraĝigi lin. Feliĉe, je tiu momento mem, rifuĝejo malfermiĝis antaŭ li: la enirejo de groto iom pli alta ol kresko de viro. Jako eniris en ĝin, sidigis sur elstaraj ŝtonegoj. Fine li retrovis la bonfarantan nokton. Li forlasis la diablan lumekon. Tiu ĉi lasta haltis ĉe la sojlo. Ĉu ĝi tie restos, ĝis kiam li eliros? Tute egale! La tuja kvietigo estis tia, ke li maltrankviligis pri nenio. Per unu ekrigardo, li esploris sian rifuĝejon. La luma rebrilo eniris en ĝin en sufiĉeco por montri al li internan arkaĵon pli altan ol la eksterna kavaĵo. Tiu arkaĵo internigis en la profundajoj de l' monto!

Bone! diris al si Jako, la tero estas seka. Se la bezono igos sin senti, mi povos sterniĝi kaj dormi. Mi atendu kaj okazu tio, kion Dio volos! Ni vidos, kiu estos plej obstina el tiu infera lumo kaj mi.

Je tiu preciza momento, boato albordiĝis la etetan havenon de Fiumelatte. Viro saltis teren, kaj diris al la remistoj.

« Reiru al la boato, kaj tenu la lumjetilon en la sama loko, ĝis kiam mi faros signalon. Ne estu malkvietaj pri mi. Pasante, mi prenos kamaradon; ĉar la viro estas danĝera. Mi ja rekonis lin. Li estas la plej malutila kontrabandisto de Lecco ĝis Chiavenna ».

Ne atendante respondon de siaj subuloj, ne aŭskultante la demandojn de kelkaj scienculoj alkurintaj al la bordkrutaĵo, la brigadestro Nello ekkuris al la strateto supreniranta al sia loĝejo.

Super la dormanta vilaĝo, longa trenajo brilega kaj dubeblua trairis la noktan atmosferon. Ĝi estis nek la lakta vojo, nek la hararo de dikega kometo. Ĉar la ĉielo estis malheliginta. Densaj nuboj vualis la astrojn. Tondroj proksimiĝantaj pli kaj pli anoncis la fulmotondron, kaj la hajlo ekfalis. Tie supre, en la dometo altestaranta sur la ŝtonego, juna voĉo duondormanta demandis:

(Daŭranta)

Esperantigita de

JOHANINO FLOURENS (Francujo).

# MIKSAJOJ.

## POR LA PROPAGANDO.

### Esperantaj slosiloj.

Mirindaj broŝuretoj ne pezaj (5 gramojn), enhavantaj regulojn de Esperanto kaj « vortaron ebligantan tuj kaj senprepare decifri kaj legi ĉion esperante skribitan » Enmetebraj en leteron sen pliigo de la poŝtkosto.

Jam estas pretaj la angla, germana, franca, itala, sveda, hispana eldonoj kaj riceveblaj po

**3,50 frankoj la centon (100).**

Tre rekomendindaj por la propagando. Ĉiulandaj poŝtsignoj estas akceptataj laŭ la efektiva valoro.

Proponu tiun tekston por traduki al personoj kapablaj interesi je Esperanto, ĉu samtempe la gepatralingvan « Slosilen » de S<sup>mo</sup> Ĉefeĉ.

Vojaĝantaj vilaĝoj. El « Le Magasin pittoresque » de Esp. 7068.

En Ĥin'uj'o oni renkont'as grand'a'jn flos'eg'o'jn konsist'ant'a'jn el lign'o'j por hejt'o kaj por konstru'o, sur kiu'j viva's kaj vojaĝ'ad'as loĝ'ant'ar'o sufiĉ'e grand'eg'a por ig'i spec'o'n de vilaĝ'o. Tiu vilaĝ'o de kajut'o'j est'as konstru'it'a mal'delikat'e kun la lign'aj'o'j mem kiu'j'n oni transport'as; oni tie renkont'as person'o'jn el ĉiu'j profes'i'o'j, t. e. : buĉ'ist'o'j, pan'ist'o'j, fiŝ'ist'o'j, vend'ist'o'j de riz'o, frukt'o'j, trink'aj'o'j. Est'as flos'o'j, kies long'o est'as, oni dir'as pli ol unu kilometr'o kaj kie la kajut'o'j est'as rang'it'a'j manier'e form'i strat'o'n. Por antaŭ'en' ir'ig'i ili'n, (la flosojn), oni al'port'as antaŭ'en' per boat'o'j, ankr'o'j'n, kiu'j'n oni en'akv'um'as en river'o'n kaj per ŝnur'o'j, kiu'j al ili est'as lig'it'a'j, la hom'o'j de ia flos'o antaŭ'en'ir'as pacienc'e kaj mal'rapid'e al ili'a cel' lok'o. Tuj kiam ili alven'as, la vilaĝ'o kaj la flos'o est'as dis' pec'ig'at'a'j kaj vend'at'a'j. Kelk'foje el ili oni konstru'as ar'o'n da flos'et'o'j, kiu'j antaŭ'en'ir'as en la al'flu'river'o'j'n de la river'e'g'o, aŭ kiu'j al'ir'as urb'o'n sur bord'o de la akv'a'voj'o.

### SOLVOJ DE L' PROBLEMOJ (2<sup>a</sup> Kvaronjaro).

#### Problemo 9<sup>a</sup>

relo + m = Merlo  
sur + o = Urso  
truto + s = Struto  
turo + t = Turto  
carino + e = Erinaco.  
loto + j = Lojto  
roto + s = Ostro

#### Problemo 10<sup>a</sup>.

Pastr' astr' past'.

#### Problemo 11<sup>a</sup>

O K Z A L O  
K I O M A  
Z O N O  
A M O  
L A  
O

#### Problemo 12<sup>a</sup>

Viro  
Iĝi  
Paro  
Etero  
Tondo  
Ofero

#### Problemo 13<sup>a</sup>

M oro  
O kulo  
pu N to  
T io  
ma R ŝo  
lep O ro  
S kalo  
man I ko  
pen E tri  
t R ufo.

#### Problemo 14<sup>a</sup>

FAB' FAG' FAR'

#### Problemo 15<sup>a</sup>

Karolo + ŭnu = unukolora    peti + du = deputi  
rapo + tri = raporti        dato + kvar = kvadrato  
neto + kvin = venkinto     virto + ses = servisto  
ilo + sep = pesilo         akso + ok = koakso  
lame + naŭ = almenaŭ      je + nulo = tulsejo

#### Problemo 16<sup>a</sup>

pra—ne—po

#### Problemo 17<sup>a</sup>

fringo—ringo—ingo.

#### Problemo 20<sup>a</sup>

litero O en Omaro — LeOno — tigrO

#### Problemo 21<sup>a</sup>

PAN— NAP

#### Problemo 22<sup>a</sup>

P  
I A L  
P A R U O  
L U I  
O

#### Problemo 23<sup>a</sup>

po—kal'

#### Problemo 24<sup>a</sup>

ĉerko

#### Problemo 30<sup>a</sup>

la malgranda fingro pieda.

(mi akceptis ankaŭ malgrandan fingron kaj dikan fingron manajn.)

#### Problemo 31<sup>a</sup>

Kor N ik O

#### Problemo 32<sup>a</sup>

lun' — nul'

#### Problemo 33<sup>a</sup>

kat' — rat'

#### Problemo 34<sup>a</sup>

pur' — pur'

#### Problemo 35<sup>a</sup>

G  
I R I  
G R A D O  
I D O  
O

CH. BRUNET.

### Nomaro de la gajnintoj kaj divenintoj.

Divenis: (la ciferoj metitaj post la nomoj rilatas la numerojn de la solvitaj problemoj.)

Letenneur	9 10 11 12 13 14 16 17 21 22 23 30 31 32 33 35.
Karulino	9 10 11 12 13 14 17 22 23 24 30 31 32 33 34 35.
Devoucoux-	
Rigoir.	9 10 11 12 13 14 17 21 22 23 24 30 32 33 34 35.
F.Dumezil	20 21 24 30 32 33 35.
Finot	9 10 11 12 13 14 21 23 24 30 32 33 35.
Saquet	10 12 21 23 24 30.
Gambier	23 30.
L. Holt.	9 12 14.
Bastoul	21 22 23 30 32 33 34 35
Allin	21 22 23 24 30 32 33 35
Warden	21 22 23 24 30 32 33 34 35
Sino BR	21 22 23 24 30 32 35.
Levitskij	32 34 35.
Frère	21 22 24 30.
Malfeliculo	32 35.

Klasigo por la dua kvaronjaro, kaj premioj;  
Karulino — Botelo da « Miéline Gelson ».  
Devoucoux-Rigoir — 25 belegaj poŝtkartoj algeriaj.  
Letenneur. — Unua ĉapitro de miaj memorskriboj.  
Mi lotmontris la nomojn ĉar Letenneur, Karulino, Devoucoux-Rigoir divenis 16 problemojn.



# Gazetaro.

Ni transsendas al la jenaj revuoj abononj akompanatajn de la abonkosto. — Aldoni 10 centimojn por la transsendo de la mendo.

## L'ESPÉRANTISTE.

France kaj esperante redaktata, oficiala revuo de la S f p E: 24 paĝoj da teksto, 8 paĝoj da kovriloj kun multaj sciigoj pri la grupoj kaj ĉiujsp. kaj esperantistaj verkoj. Abono: Francujo 3 fr.; alilande: 3,50 fr. Administracio: Louviers, (Eure), France.

## GERMANA ESPERANTISTO.

Organo de diversaj germanaj grupoj esperantistaj (ĉiumonate). Redaktata germane kaj esperante. JARA BONO: 3 f. 75 Administracio kaj Redakcio: Esperanto Verlag, Möller & Borel, Berlin, S., 95, Prinzen strasse.

## LA BELGA SONORIO.

Bonega propaganda revuo: Esperante, france, flandre. Unu el la plej malnovaj kaj seriozaj gazetoj Esperantaj. Sciigoj — Literaturo — Scienco. Eliras ĉiumonate. Abono: 4 fr. jare. Kolektoj de antaŭaj jaroj: 6 fr. Ĉe J. Coox, Duffel, (Belgique) kaj ĉe *Tra la Mondo*.

## SUNO HISPANA.

Hispane kaj esperante. Tre grava monata revuo por la propagando de Esperanto en hispanlingvaj landoj, bonega redaktata sub direktado de A. Jimenez Loira. Rakontoj pri hispanaj kutimoj kaj tradukoj laŭ famaj hispanaj aŭtoroj. Abono 3 fr., unu numero 30 cent. Administracio kaj redakcio: *Avellanes*, 41, presejo — Valencia (Espana).

## ESPERO PACIFISTA.

Monata organo de l'Esperantista Societo por la Paco. Jara abono (aŭ minimuma kotizo al la Societo), 5 frankoj. Krom avizo kontraŭa, la abonintoj estas konsiderataj kiel aliĝintoj al la Societo; tiu ĉi akceptas aliĝojn opajn. Sin turni al Sro Gaston Moch, 26 rue de Chartres, Neuilly-sur-Seine (Francujo).

## THE BRITISH ESPERANTIST.

oficiala monata organo de la Brita Esperantista Asocio; 12 paĝoj da novaĵoj, k. c., anglo-Esperante, kaj 8 paĝoj da Aldono tute en Esperanto. Jare 4 fr. (sen Aldono 2 fr.) — Oni abonas ĉe la Sekretario de la B. E. A., 13, Arundel Street, Strand, London.

## UNUA PAŜO.

Monata bulgara gazeto en Esperanto. Priraktas speciale bulgaraĵojn: morojn, literaturon, k. t. p.: jare, 3 fr.; duonjare, 2 fr. — Ĉe Sro S. Petkov, 26, Strato San-Stefano, Sofia, Bulgario.

## SVISA ESPERO.

France kaj esperante — 2 fr. — Ĉe Sinjoro Renard, 6, Rue du Vieux Collège, Genève.

Sendu mendojn kaj anoncojn kun poŝtaj mandatoj al « Administranto de *Tra la Mondo* », 15 Boulevard des 2 Gares, Meudon (S. et O.), France, antaŭ la 10<sup>a</sup> de ĉiu monato, por la venonta numero.

## ĈIAM TRE LEGBLE SKRIBU.

GÉRANT: EUGÈNE CAPÉ.

A. J. WITTERYCK, Presisto, Bruĝo.

## LINGVO INTERNACIA.

Monata esperanta revuo. Fondita en 1895. Literatura kaj propaganda tute en Esperanto.

Abono 7,50 fr. ĉiulande. Unu numero 0 f 50. Abono estas akceptata de l'komencigo de ĉiu monato.

## ANTAŬEN ESPERANTISTOJ

Hispane kaj esperante. — Organo de la Perua esperantista societo — 3 fr. — Administranto, Antonio Alvarado, apoteko del Teatro, Calle Lártiga, Lima (Peruo).

## ESPERANTISTEN.

Svede kaj esperante. Organo de la Svedaj Esperantistoj, fondita de la Stokolma Klubo. Tre subteninda por helpi esperantistan movadon en Svedujo. Ĉe P. Ahlberg, 37, Surbrunnsgatan, Stockholm.

3 fr. 75 ĉiujare; aparta N<sup>o</sup>: 35 cent.

## ĈILIO ESPERANTISTA.

Senpaga organo propaganda, hispane kaj esperante.

Ĉe So L. E. Sepulveda Cuadra, Casilla 1989 (Santiago-Chile).

## ESPERANTO.

Hungare kaj esperante. Scienca kaj literatura.

4 fr. ĉiulande. Ĉe So Marich Agoston, Papnövelde-Uteza 6, Budapest, IV. (Hungarujo).

## RUSLANDA ESPERANTISTO.

Ĉiumonata organo de la S-to «Espero» en lingvoj Esperanta kaj parte en rusa — Diversspeca, interesa kaj bonstila literatura materialo: artikoloj pri la problemoj de lingvo internacia kaj pri Esperanto; vasta kroniko de Esperantista movado (propraj korespondantoj) kaj bibliografio; sociala politika fako; novaj famaj beletristikaj (interalie en 1906 j. estos presata la « Ruĝa Rido » de L. Andrejev), versaĵoj kaj mult. al — La detalaj prospektoj estas riceveblaj, senpage. — La jara abonpago (kune kun membriĝo en la S-to «Espero») — 3 rubloj (7 fr. 50 cent.) — Adreso: Ruslando, St Peterburgo, B. Podjačeskaja, 24, al la S-to «Espero.»

## ESPERANTA LIGILO.

Monata revuo por blinduloj per esperanta Braille a sistemo. 3 f. — Ĉe So Cart, 12 Rue Soufflot, Paris.

## ESPERO KATOLIKA.

Tute esperante. Unu N<sup>o</sup> afrankita 0 f. 50 Francujo, 4 fr.; alilande 5 fr. Presejo Barbot, 15, r. Etienne Pallu, Tours (France).

## La plume Sténographique de France.

Universala revuo ilustrata de Stenografio kaj Daktilografio — D<sup>ro</sup> L. P. Canet, Adm., 15, Rue Manigne, Limoges. — Ĉiulandaj sciigoj pri ĉio rilatanta la rapidan skribadon kaj la skribmaŝinojn; ĉiustema stenografio, literatura kaj historia fako, ilustraĵoj, ludoj, k. t. p. Petu specimenon.

## Sinjorinoj!

Se vi volas ne plu suferi je la monataj sangel-fluoj aŭ je la epoko de ilia malapero, ensorbu la

## DRAGÉES BLOTTIÈRE

sendanĝeran produktaĵon, bombonforman, kiu tuj kaj certe forigos la doloron.

Por havigi la Dragées Blottière, sendu 2.25fr. poŝt-aŭ kartmандате, 102, Rue Richelieu, PARIS.

## Les Annales politiques et littéraires.

Jare: 10 f. — 15, rue St-Georges, Paris. Abono: 10 fojojn repagita per la profito de l'« Carnet de la mutualité des Annales » (Libreto de l'reciproka apogo de Annales).

## JUS APERINTA!

FRANÇOIS COPPEE

## Unua Ĉapitro

de miaj memorskriboj

ESPERANTIGITA DE  
AUGUSTE MOXTROSIER



PREZO: 75 CENTIMOJ.

PARIS  
ALPHONSE LEMERRE, ELDONISTO  
23-31, PASSAGE CHOISEUL, 23-31

© DCCCLV

Ĉarma verketo de l' fama franca akademiano, kun antaŭparolo tute aproba por Esperanto.

Ĉe « Tra la Mondo ».

Belegaj propagandaj poŝtkartoj kun vidaĵoj de Alĝerio;

1 fr., afrankite, ĉiu dekduo.

Propagandaj poŝtkartoj de « Tra la Mondo »  
fr. 1,50 ĉiu cento.

Ĉe « TRA LA MONDO ».